1982 februaro
75-a jaro
n-ro 914 (2)
aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando

Ĉinio liveras novajn agad-ekzemplojn

Vi trovos,

ke granda parto de ĉi tiu numero dediĉiĝas al la t.n. Tria Mondo, precipe se vi konsentas kalkuli ankaŭ Ĉinion en tiu granda ŝtatogrupo. Tre ampleksa raporto de Tibor Sekelj pri la kontaktoj kun kelkdeko da altrangaj diplomatiaj reprezentantoj de tiuj landoj devus esti vera minejo por Isaj Dratwer kaj nova eldono de lia verko "Pri internacia lingvo dum jarcentoj" (ankoraŭ aĉetebla kontraŭ 30 gld). Cetere, ni vidas la gravecon de la kontaktoj de s-ro Sekelj ne nur en tio, ke ni nun disponas pri novaj favoraj deklaroj pri Esperanto, sed unuavice en la fakto, ke ĉiuj tiuj eminentuloj (vidu la paĝojn 25 – 28) nun mem ricevis pli klaran bildon pri la Internacia Lingvo kaj ĝiaj ebloj. Kaj, eĉ se ni ne avertus vin pri tio, vi certe ne maltrafus la ĉi-fojan ĉefartikolon. Tie, tiu flegma (se oni tiel rajtas epiteti vicprezidanton de UEA) italo Corsetti, en sia kutima malflegma maniero, ludas per fajro kaj pajlo kaj klopodas flamigi la langojn pri kelkaj gravaj demandoj de la hodiaŭa Movado. Por paroli pri pli trankvilaj temoj, ni diru, ke ne plu pluvas en Nederlando, jam tutan duonhoron. Eventuale, baldaŭ venos printempo, tiu sezono de vekiĝo totala. Eventuale, ĝi sukcesos veki ankaŭ la dormantan plimulton de la Movado.

Enhavo

21 Movado kaj Manifesto de Raŭmo: La necesaj piroteknikaĵoj (Renato Corsetti)
22 Novaĵoj el Ĉinio: Nova organizaĵo por influaj apogantoj (Dai Song-en)
Instruado: Pliaj dudek ĉinaj altlernejoj instruos Esperanton
24 Volontula Servo: Brito volontulas en Pekino
25 Esperanto kaj nealiancitaj landoj: Kion opinias ambasadoroj (Tibor Sekelj); Centjara jubileo de Esperanto: Konkurso pri jubilea simbolo
26 Informado: Bona kaj malbona ekzemploj (S.M.)
28 Ĉi-jara kongresa lando: Belgio ekzistas, belgoj apenaŭ (E. Symoens)
29 Kongresa komuniko (novaĵoj pri la 67a Universala Kongreso)
30 Ankoraŭ pri generaciaj aspektoj de la Movado: Mezaĝuloj mankas, ĉar ni proponas nenion al ili (Stefan Maul)
32 Manuskriptoj: Ĉu perdiĝis la traduko de "Milito kaj paco"? (Charles R.L. Power)
33 Libromerkato: Vendejo kun 43 000 libroj (S. Milojević)
34 Recenzoj: "Apologio de Sokrato" kaj "Kritono" de Platono / Albert Goodheir (Rikardo Ŝulco); "Vjetnama Socialisma Respubliko" de pluraj aŭtoroj (R. Corsetti); "Pri Jugoslavio", "Tito", "Historiaj radikoj de nealianciĝo", "Meze de Eŭropo. . .", "Skizo pri Ĉinio" (Ulrich Lins), "Skiza historio de la utao" de M. Miyamoto (Xu Daorong)
35 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
36 TEJO-paĝo: Eksteraj rilatoj de TEJO: Jam preparoj por Junulara Jaro en 1985 (Martin Haase)
37 Nekrologoj: V.L. Cao, F. Epstein, O. Kayser, E. Lewis, P. Polišĉuk, H.V. Rasmussen, G.G. Sevak
Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
39 Membrostatistiko: La membraro de UEA en 1981
40 Oficiala informilo de la CO de UEA; Anoncetoj; Esperanto en radio

La kovrilo

Kiel en la februara numero de 1979, jen la ĉinoj denove invadas nian kovrilon. Se ni (aŭ ili) faros la samon ree en iu el la sekvantaj februaroj, tio minacos fariĝi tradicio, ĉu ne? Krome, vi preskaŭ povus akuzi nin pri iaspeca kolora rasismo, ĉar la plimulto de niaj numeroj kun gravaj novaĵoj el Ĉinio – havas flavan koloron. Nu, eĉ se ĉinoj mem ne estus flavhaŭtaj, ili ja havas Flavan Maron, Flavan Riveron kaj simile. La kovrilo, kompreneble, rilatas la grandan novaĵon, kiun prezentas la artikolo sur la paĝoj 22 – 24. Se vi legos tiun tekston – nepre faru! –, vi sukcesos diveni ankaŭ la nomojn de la kovrilvizaĝoj.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenwg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. **Telefono:** (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). **Fondita** en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande. Petu de via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero 4,– gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri planado kaj landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, via delle Cave 82/C, I-00181 Roma, Italio; tel. (06) 78 89 970.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj edukado: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavik, Islando; tel. (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, C.P. 04-0097, BR-70000 Brasília (DF), Brazilo; tel. (061) 226-8101.

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (031) 51 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; tel. 65 52 43.

Estrarano pri esploroj kaj kunordigo de eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce Street, Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 387-8288.

Maandelijks tijdschrift "esperanto", nr. 914 (2), februari 1982. Verantw. uitgever: G. Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, België

MOVADO KAJ MANIFESTO DE RAŬMO:

La necesaj piroteknikaĵoj

"FANTOMO vagas tra Eŭropo". Tiu komenca frazo de **la** manifesto tute ĝuste povas aplikiĝi al la stato de la debato pri "nia", lastatempa, multe pli senpretenda manifesto de Raŭmo.

Kio okazis en Raŭmo? Simple, parto de la partoprenantoj en la 36a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en tiu suoma urbo, en 1980, subskribis manifeston, kiu substrekas la neverŝajnecon de la fina venko en la venontaj kelkaj jaroj, kaj invitas esperantistojn ĝui la Internacian Lingvon pro ĝia nuna valoro. Alivorte, diras la homoj el Raŭmo: "Ĉesu distrumpteti pri grandiozaj venkoj ĉe UN, pri senprecedencaj antaŭensaltoj en tiu aŭ alia lando, pri dekoj da milionoj da esperantistoj tra la mondo, ktp. kaj agnosku ke ni estas ĉiuj anoj de lingvokomunumo, kiu kapablas regali siajn anojn per unike internaciaj kontaktoj kaj spertoj. Tio estas la kialo de nia restado en la movado, tio estas la argumento, per kiu ni povus konvinki aliajn homojn lerni la lingvon kaj eniri la komunumon. Ĉio cetera estas garnaĵo por kongresmalfermaj paroladoj."

Kiel reagis la Movado al ĉi tiu sakrilegia aserto?

La granda plejmulto, nia silenta plejmulto – mi aludas je la miloj da "simplaj" esperantistoj, kiuj vizitas niajn klubkunvenojn kaj interŝanĝas siajn salutkartojn – apenaŭ rimarkis, ke io okazas. Cetere ĝi ankaŭ apenaŭ rimarkis la same revoluci-anoncan deklaracion de Tyresö antaŭ deko da jaroj. Ili ja vivas sian esperantistan vivon kun ĉiuj ĝiaj ĉiutagaj problemoj (Kie trovi taŭgan ejon por la ĉi-jara kurso? Ĉu altigi la klubkotizojn pro la kreskanta inflacio? En kiu restoracio ni aranĝos la Zamenhof-feston? Kiu pretas gastigi la novzelandan esperantiston, kiu vizitas nian urbon?), kaj ili opinias, ke estas bele ke kelkaj bonŝancaj gejunuloj sukcesas vojaĝi al internaciaj kongresoj kaj intelektule debati pri tedaj temoj. Tio estas ĉio.

Junularo demandsignas movadajn agmanierojn kaj celojn.

Parto de la maljunaj gvidantoj de Esperanto-organizaĵoj tute preteratentis la manifeston. "Tio estas io, pri kio debatas la junularo, anstataŭ kunlabori laŭ niaj lastaj laborplanoj. Oni ja scias, ke nuntempaj gejunuloj ŝatas babili sed tuj malaperas kiam prezentiĝas konkreta laboro."

Tiuj, kiuj estis pli trafitaj de la manifesto, estas la homoj de la meza generacio, kiuj siatempe svingis la flagon de Tyresö. Eble ne senutilas memorigi, ke dum la kongreso de TEJO en Tyresö en 1969 oni aprobis deklaracion, kiu klare substrekis la socipolitikan valoron de Esperanto kaj instigis la esperantistojn senĝene kaj kun fiero ataki la mondon, ĉar ni ne nur batalas por lingvo sed kontraŭ lingva diskriminacio, por kultura demokrateco, ktp. Tiu deklaracio estis la gvidanta kometo por aro da aktivuloj, kiuj intertempe integriĝis en la oficialan Movadon kaj transprenis ofte gvidajn rolojn (kio en si mem devigis ilin rezigni pri parto de sia junaĝa radikaleco).

Preskaŭ ĉiuj el ili vidas en la manifesto iun malhelan danĝeran nubon, kaj ili klopodas kaŝi ankaŭ al si mem la sentojn de timo (la junularo kritikas nin eble prave) kaj ĝeno (kiel tiuj senspertuloj aŭdacas demandosigni la koheran ideologion, kiun ni starigis?).

Kaj tamen, laŭ mia tute persona opinio, ili devus senti nek timon nek ĝenon.

La socia engaĝiĝo, kiu originis en Tyresö, kaj kiun tiuj homoj reprezentas, fariĝis parto de la esperantista idearo. Apenaŭ troviĝas membro de loka entomologia (tio estas: papili-kolekta) Esperanto-rondo, kiu ne scias ke per Esperanto oni celas sendiskriminacian internacian interŝanĝon, kiu ne aŭdis prelegon pri la maljusteco, kiun aplikas parolantoj de grandaj lingvoj kontraŭ parolantoj de malgrandaj lingvoj.

Sed intertempe pasis dek jaroj kaj bonŝance postsekvas nin nova generacio de esperantistoj, kiuj rigardas la mondon ĉirkaŭ si per "freŝaj" okuloj. Ankaŭ ili, kiel ni niatempe, sin demandas pri la plej taŭga maniero por respondi al la demando de neesperantista juna homo: "Kial finfine mi lernu Esperanton?"

La manifesto de Raŭmo estas klopodo trovi respondon taŭgan por la nunaj gejunuloj. Mi ne volas ĉi tie aserti, ke ĝi estas tute bona respondo. Male, mi havas dubojn pri partoj de ĝi, fortajn dubojn. Sed, se iu kapablas trovi la taŭgan respondon, tiu certe ne apartenas al nia generacio sed al la raŭmanoj. Kompreneble ili uzis, kaj daŭre uzas en artikoloj, esprimojn, kiuj celas ŝoki nin: niaj celoj estus la "praceloj", ni kondukis ilin al "identecokrizo", kaj simile. Ĉu ni lasos nin ŝoki de tiaj piroteknikaĵoj? Siatempe ni atakis la "mucidan neŭtralecon" kaj la "frak-esperantistojn" per samaj vortaj piroteknikaĵoj.

Konklude, kvankam mi malsamopinias kun kelkaj el la asertoj de la Manifesto de Raŭmo, kvankam mi opinias, ke la subskribintoj de tiu manifesto profunde

mistaksas la bezonon de organiziteco en la nuna evolustadio de la Movado, mi ĝojas ke nova pensofluo envenis la Movadon. Epokoj, kiam ideologioj ne ŝanĝiĝas, estas ŝtoniĝintaj epokoj. Landoj sen ideologia debato paŝas al ŝtoniĝo. Estus vere bedaŭrinde, se la nuna TEJO estus nur papaga imitanto de la tiama TEJO.

Per ĉi tiu artikolo mi esperas instigi pli da homoj al debatado pri la fundamentaj ekzistokialoj de la Movado kaj pri la ĝusteco de niaj agaddirektoj. Ne ekzistas finaj veroj, ne ekzistas daŭra ekvilibro. La evoluo sur ĉiu kampo, inkluzive de la Esperanto-movado, postulas adan rompon kaj adan retrovon de ekvilibroj. Ni devus serioze timi kaj ĝeniĝi nur se post dek jaroj ne aperos nova "Alvoko de Tokio" aŭ "Deklaro de Pfaffenheim", kiu tute renversos la Manifeston de Raŭmo.

Renato Corsetti

NOVAĴOJ EL ĈINIO:

Nova organizaĵo por influaj apogantoj

LA 6an DE DECEMBRO 1981, solene fondiĝis en Pekino la nova organizaĵo "Amikoj de Esperanto". Ĝi konsistas el reprezentantoj de Ĉina Popola Kongreso (parlamento), membroj de Tutlanda Komitato de Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, respondeculoj de centraj kaj regionaj ministerioj, famaj personoj de la sferoj literatura, arta, kultura, eduka, ĵurnalisma, eldona, scienca, teknika kaj religia. La organizaĵo nun havas 98 anojn kaj ĝi akceptos novajn membrojn. Jenaj dek personoj estas la iniciatintoj:

Chu Tunan, membro de Konstanta Komitato de Tutlanda Popola Kongreso kaj vicprezidanto de Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj;
Hu Yuzhi, vicprezidanto de Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo;
Bakin, membro de Konstanta Komitato de Ĉina Popola Kongreso, vicprezidanto de Ĉina Federacio de Literatura kaj Arta Rondoj kaj aganta prezidanto de Ĉina Verkista Asocio;
Xia Yan, vicprezidanto de Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj, vicprezidanto de Ĉina Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoj kaj prezidanto de Ĉina Filmista Asocio;
Xie Bingxin, vicprezidantino de Ĉina Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoj kaj fama verkistino;
Zhao Puchu, membro de Konstanta Komitato de Ĉina Popola Kongreso kaj prezidanto de Ĉina Budhisma Asocio;
Bai Shouyi, membro de Konstanta Komitato de Ĉina Popola Kongreso kaj fama profesoro pri historio;
Ĵelezo, vicprezidanto de Komisiono por Reformo de



Fama verkisto Bakin (en 1981 li kandidatis por Nobelpremio) parolas en la fondkunveno de "Amikoj de Esperanto"

INSTRUADO DE ESPERANTO:

Pliaj dudek ĉinaj altlernejoj instruos Esperanton

KUN APROBO de la Eduka Ministerio, Ĉina Esperanto-Ligo funkciigis Esperanto-kurson por altlernejaj fremdlingvaj instruistoj. La kurso funkcias en la kadro de Pekina Fremdlingva Instituto. 21 kursanoj venis de 16 altlernejoj el pluraj partoj de Ĉinio. Post unujara lernado ili instruos Esperanton en siaj lernejoj. La kurson gvidas Li Shijun, redaktoro de *EPĈ*, kaj Dai Song-en, laboranto de ĈEL.

En la inaŭguro de la kurso, okazinta la 10an de novembro 1981, ĝenerala sekretario de ĈEL Zhang Qicheng kaj vicĉefsekretario Li Naixi informis la kursanojn pri la Internacia Lingvo Esperanto, emfazis la neceson lerni la lingvon kaj kore deziris al ili grandan sukceson. Nun la kursanoj lernas diligente kaj progresas rapide.

Ĉio ĉi estas ege grava paŝo por la plua disvastigo de Esperanto en Ĉinio. Fakte, ne temas pri 21 hazardaj studentoj, kiuj nur laŭ sia privata elekto venis al Pekino por dum unu jaro studi Esperanton. Ili ĉiuj estas senditoj de la altlernejoj kie ili jam laboras kiel fremdlingvaj instruistoj. Tio ja signifas, ke post unu jaro ĉiuj ĉi lernejoj enprogramigos la instruadon de la Internacia Lingvo. Ni ne memoras, ke simila entrepreno por eduki kvalifikitajn altlernejajn instruistojn de Esperanto ĝis nun okazis je tia nivelo en iu alia lando.

Chu Tunan, prezidanto de "Amikoj de Esperanto": Mi faros mian eblon por la Internacia Lingvo.

Ĉina Skriba Lingvo kaj vicprezidanto de ĈEL; **Zhu Jiusi**, rektoro de Inĝeniera Instituto en Centra Ĉinio.

La fondan kunvenon ĉeestis membroj de "Amikoj de Esperanto", respondeculoj de koncernaj ministerioj kaj aliaj instancoj kaj pekinaj geesperantistoj – sume pli ol 150 homoj. Krom la iniciatintoj Chu Tunan, Bakin kaj Bai Shouyi, inter ili troviĝis Zhou Peiyuan, vicprezidanto de Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj prezidanto de Ĉina Scienca kaj Teknika Asocio; Kong Yuan, membro de Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio kaj vicĉefsekretario de Konstanta Komitato de Ĉina Popola Kongreso; Hu Sheng, membro de Konstanta Komitato de nomita Kongreso kaj fama historiisto; Zhang Youyu, vicestro de Ĉina Sociologia Akademio; Wang Zhongfang, vicministro de Liga Komisiono de Kulturaj Rilatoj kun Fremdaj Landoj; Yang Yunyu, vicministrino pri eduko; Wang Weicai, vicdirektoro de Ĉina Popola Banko; Liu Daosheng, sekretario de Ĉina Kompartio de Pekino; Wang Du, vicsekretario de Ĉina Kompartio de Interna Mongolio; Zhou Gucheng, vicprezidanto de Konstanta Komitato de Popola Kongreso de Ŝanhajo; Zhu Jiabi, vicprezidanto de Politika Interkonsiliĝa Konferenco de la provinco Yunnan; Chen Yuan, ĉefredaktoro de Komerca Eldonejo kaj vicprezidanto de ĈEL; kaj pluraj famaj verkistoj, pentristoj kaj historiistoj de Ĉinio. S-ino Lin Liyun, membro de Centra Komitato de Ĉina Kompartio kaj membro de Konstanta Komitato de Ĉina Popola Kongreso, letere esprimis sian varman gratulon. La supre menciitaj personoj ĉiuj estas membroj de la nova organizaĵo "Amikoj de Esperanto".

La kunvenon prezidis Ye Junjian, membro de sekretariejo de Ĉina Verkista Asocio kaj membro de Konstanta Komitato de ĈEL. Zhang Qicheng, ĝenerala sekretario de ĈEL, raportis pri la preparoj por fondi "Amikoj de Esperanto" kaj konigis la sukcesojn de la ĉina Esperanto-movado dum la lastaj tridek jaroj.

"Ni estas tre ĝojaj", diris s-ro Zhang, "ke estas tiel multaj eminentuloj de Ĉinio, kiuj simpatias kaj subtenas Esperanton. Tio estas granda kuraĝigo por la ĉinaj esperantistoj. 'Amikoj de Esperanto' celas komprenigi al pli multaj ĉinoj Esperanton kaj la neceson kaj signifon ĝin lerni, plue disvastigi Esperanton en Ĉinio, doni moralan subtenon al la internacia Movado, akceli la Movadon disvolviĝi pli rapide. Ni kredas, ke la fondiĝo de 'Amikoj de Esperanto' estas grava evento kun historia signifo kaj granda movforto ne nur por la ĉina Movado, sed ankaŭ por la Movado internacia. Subtenate de 'Amikoj de Esperanto', la ĉina Movado rapide progresos kaj havos brilan perspektivon."

En la kunveno paroladojn faris ankaŭ Bakin, Hu Sheng, Liu Daosheng, Wang Zhongfang kaj Ge Baoquan. Ili emfazis, ke Esperanto ne nur portas en si la idealon forigi miskomprenon inter la homoj, likvidi lingvan diskriminacion kaj ĉian ajn diskriminacion kaj defendi mondpacon, sed ĝi ankaŭ ludas la realan rolon en la plifortigo de la kompreniĝo kaj amikeco inter diverslandaj popoloj kaj diversaj nacioj, en la akcelado de la internacia kultura interŝanĝo. Tial Esperanto estas aprobinda kaj aprobenda. Ili ankaŭ retrorigardis la ĉinan Movadon dum tre malfacilaj jaroj antaŭ la Liberiĝo kaj esperis, ke la junaj esperantistoj heredos kaj disvolvos la bonajn tradiciojn de la veteranaj esperantistoj, diligente lernos, sinforgeseme laboros por Esperanto kaj kontribuos al la disvastigo de Esperanto en Ĉinio kaj en la mondo.

La ĉeestantaj membroj de "Amikoj de Esperanto" unuanime elektis s-ron Chu Tunan kiel prezidanton kaj s-ron Zhang Qicheng kiel ĝeneralan sekretarion de la nova organizaĵo. Poste parolis s-ro Chu Tunan, kiu diris:

"Tiuj, kiuj studas kaj disvastigas Esperanton, havas noblan idealon kaj bonan deziron, tio estas, paŝo post paŝo fari Esperanton komuna lingvo de ĉiuj nacioj kaj popoloj de la mondo, pere de kiu la homoj povos pli bone kompreni kaj respekti unu la alian kaj krei grandan harmonian socion. Sen komuna lingvo la homaro

DE LA 21a
ĜIS LA 27a
DE FEBRUARO:

Semajno de internacia amikeco

ne povos akiri veran emancipon, veran liberecon kaj veran feliĉon. Memkompreneble, tio estas idealo malproksima, espero malproksima. Tamen, tio ne gravas, ĉar Esperanto ĝuste havas la sencon de la espero. Esperantistoj kune klopodu, per diversaj manieroj kaj tra diversaj kanaloj, por iom post iom realigi tiun ĉi idealon, tiun ĉi esperon. Mi estas nur amatoro de Esperanto, amiko de Esperanto. Mi tre dankas, ke hodiaŭ vi donis al mi vian konfidon, tio estas inspiro por mi. Kaj mi faros mian eblon por Esperanto!"

La fondiĝo de "Amikoj de Esperanto" vekis grandan intereson kaj atenton ĉe la ĵurnalismaj rondoj de Ĉinio. Novaĵagentejo Xinhua, Ĉina Novaĵagentejo, Centra Radiostacio, Radio Pekino, Popola Ĵurnalo, Luma Ĵurnalo, Laborista Ĵurnalo, Ĉina Ĵurnalo (en la angla lingvo), Pekina Ĵurnalo, Pekina Vespera Ĵurnalo, Radiostacio de la urbo Pekino, Pekina Televido – ĉiuj raportis pri la fondiĝo de "Amikoj de Esperanto". Ankaŭ Reuter de Britio kaj Dankong-a Ĵurnalo de Hongkongo publikigis koncizajn informojn. Nia fama verkisto Duanmu Hongling (membro de "Amikoj de Esperanto") verkis poemon por celebri la fondiĝon de la organizaĵo. La poemo aperis en Pekina Ĵurnalo, la 14an de decembro.

Dai Song-en (ĈEL)

Geoffrey Sutton, pri kiu temas la suba teksto, pozas kun pekinaj esperantistoj. Sutton (centre, malantaŭe, kun barbo) festparolis en la jarkongreso de Pekina Esperanto-Asocio. En tiu kunveno, okazinta la 15an kaj 16an de januaro 1982 en unu el la salonoj de la fama Popola Halo, partoprenis ĉ. 200 personoj, inter kiuj ankaŭ multaj gejunuloj. Dum la pasinta jaro, Pekina Esperanto-Asocio organizis 17 novajn kursojn por ĉ. 680 gelernantoj de Esperanto.

VOLONTULA SERVO:

Brito volontulas en Pekino

REKOMENDITE de UEA kaj invitite de Ĉina Esperanto-Ligo, brita esperantisto Geoffrey Sutton, kiel unujara volontulo de *El popola Ĉinio*, venis Pekinon la 17an de oktobro 1981. Lia ĉefa tasko estas poluri tradukojn kaj lingve trejni ĉinajn esperantistojn.

Honore al li, s-ro Zhang Qicheng, ĝenerala sekretario de ĈEL kaj ĉefredaktoro de *EPĈ*, aranĝis bankedon kun la fama ĉina frandaĵo – rostita anaso. S-ro Sutton estis varme bonvenigata ankaŭ de la aliaj laborantoj de ĈEL kaj *EPĈ*, kiuj esperas multe lerni de li. Akompanate de ĉinaj samideanoj s-ro Sutton vizitis pitoreskejojn kaj vidindaĵojn de Pekino kaj spektis tradiciajn ĉinajn akrobataĵojn. Li iom post iom kutimiĝis al la ĉina medio, kaj nun harmonie laboras kun la ĉinaj gekolegoj.

S-ro Sutton estas fervora esperantisto, kiu i.a. servis kiel oficisto de UEA tri jarojn. Kiel la unua eksterlanda laboranto de *EPĈ*, li plene konscias pri sia respondeco. Li diris: "Mi esperas, ke mi povos plenumi kelkajn el viaj naturaj atendoj. Mi jam certas, ke ni bone kunlaboros kiel gekolegoj kaj ni sendube lernos multe unu de la alia. Ni kune laboru por vere internacia movado kun niaj okuloj egale malfermitaj al ĉiuj landoj kaj popoloj de la mondo."

Jes, por atingi veran internaciecon, niaj lingvo kaj Movado bezonas internacian kunlaboron en sia plua disvastigo kaj progreso. Ĉi-rilate s-ro Geoffrey Sutton donas bonan ekzemplon. Tio ĉi estas historia okazaĵo en nia Movado. Ni esperas, ke nia kunlaboro estos fruktodona kaj kontribuos al la progresigo de Esperanto en Ĉinio sed ankaŭ en la tuta mondo.

(Komuniko de Ĉina Esperanto-Ligo)

Kion opinias ambasadoroj

JAM ANTAŬ TRI JAROJ mi komencis paroli kaj skribi pri tio, ke la movado de nealiancitaj landoj povus esti fruktodona kampo por la disvastigo de Esperanto. Fakte, ne tiom por la semado de densa herbaro kaj multkoloraj floroj, kiom por ekplanto de fortikaj arboj, kies brancoj povus etendiĝi mondvasten, trans ĉiujn limojn.

Fine, kiam la Komitato de UEA en Brazilio nomis min komisiito pri nealiancitaj landoj, mi eksentis, ke alvenis la momento por malpli paroli kaj ekagi pli konkrete. Sed kie komenci ataki la centkapan drakon? Kiel aliri la movadon, kiu grupigas cent landojn, sed ne havas komunan sidejon nek konstantan estraron?

Mi konsciis pri du gravegaj faktoroj, unu negativa, alia pozitiva. La negativa estas, ke en la cent landoj – ĉiuj triamondaj – preskaŭ nenie ekzistas Esperanto-movado bone organizita. Esceptoj estas Jugoslavio, Kubo, Irano, Hinda Unio, Madagaskaro, Malto kaj Peruo, en kiuj oni pli aŭ malpli organizite laboras. La alia faktoro, la pozitiva, estas, ke ŝtatestroj, ministroj kaj aliaj funkciuloj kaj fakuloj el tiuj landoj kunvenadas kun la emo interkompreniĝi, kaj faras tion plej ofte en la angla kaj la franca, lingvoj al ĉiuj ili ne nur fremdaj, sed eĉ malŝatataj kiel lingvoj de iliaj iamaj koloniaj mastroj. Ekzistis tria faktoro, ankaŭ pozitiva: kiel jugoslavo, ŝtatano de la sola eŭropa nealiancita lando, konanta la lingvon, landon kaj eminentulojn de multaj el tiuj ŝtatoj, mi estis avantaĝe kvalifikita por la tasko.

Sed kun kiu paroli? Kie trovi la kompetentajn reprezentantojn de la cent landoj el kvin kontinentoj? Plej bone estus sendube diskuti la problemon kun ĉiu landa aŭtoritato mem, surloke. Sed por tio mankas tempo, mono, homoj. . . Ni decidis do, ekagi en la du plej grandaj kunvenejoj de iliaj reprezentantoj: en Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko. Tiel mi pasigis po unu monaton en Nov-Jorko kaj Parizo, inter la 14a de novembro kaj la 22a de decembro 1981.

En tiu tempo mi sukcesis intervjui tridekon da reprezentantoj el la sama nombro de landoj, klarigi al ĉiu el ili tion, kion li aŭ ŝi ne sciis pri la Internacia Lingvo kaj ĝiaj avantaĝoj por la nealiancitaj landoj, por la internaciaj organizaĵoj kaj por la mondo ĝenerale, kaj ankaŭ ekhavi de ĉiu el ili reagon al tiuj ideoj. Tiuj reagoj, kompreneble, malofte estas definitivaj starpunktoj de tiu aŭ jena lando aŭ ĝia registaro, sed estas nur persona opinio de la intervjuito. Por ekhavi pli firmajn opiniojn de registaroj, pli vasta informa agado mondskala, direktita al la ĝustaj institucioj kaj personoj, estus necesa.

Interese estas noti, ke el la 28 opinioj nur unu estas negativa, dum ĉiuj aliaj, pro diversaj motivoj, entuziasme aliĝas al niaj celoj kiel ĝiaj apogantoj kaj favorantoj.

CENTJARA JUBILEO DE ESPERANTO:

Konkurso pri jubilea simbolo

EKZISTAS amaso da simboloj kaj tuta scienco pri ili kaj ilia rilato al la homa menso. Ankaŭ esperantistoj posedas simbolojn, kaj iuj eĉ opinias, ke ni uzas tro da ili. Tamen, ni nun bezonas unu plian. . .

Kiel vi jam legis en ĉi tiu revuo (oktobro 1981), komenciĝas la agado por festi la centjaran jubileon de la Internacia Lingvo en 1987. Tio, kion ni nun bezonas, estas "taŭga simbolo por la festado", kiel simple diras la agadprogramo por la jubileo aprobita de la Komitato de UEA.

Ĝi emfazu nian centjaran historion, la pluvivon kaj daŭran plilarĝiĝon de nia komunumo kaj, samtempe, niajn celojn kaj nian pretecon fronti la duan jarcenton de Esperanto.

Ĉu tio estas montrebla per simbolo, kiu, laŭ la menciita programo, devas krome esti "presebla per unu koloro kaj facile komprenebla al la ekstera publiko"? La Estraro de UEA opinias ke jes, kaj pro tio ĝi lanĉas konkurson por tiu simbolo.

Rajtas partopreni kaj membroj kaj nemembroj de la Asocio. Tio praktike signifas, ke esperantisto partoprenonta la konkurson rajtas peti la helpon de neesperantista artisto por pretigo de la simbolo aŭ povas instigi neesperantistan grafikiston rekte partopreni.

Limdato por ricevo en la Centra Oficejo de la konkursaĵoj estas la 31a de oktobro 1982. La premio por la gajninto de la konkurso estas 1 000 nederlandaj guldenoj. La premian sumon pagos UEA. Decidon pri la aljuĝo de la premio faros la Estraro de UEA antaŭ la fino de 1982.

Do, se vi mem aŭ via konato okupiĝas – prefere profesie – pri la grafikaj artoj, kial ne defii la fortunon. Se vi estos bonŝanca, vi havos la plezuron vidi dum kelkaj jaroj vian kreaĵon vaste uzata sur leterpaperoj, en eldonaĵoj ktp. de UEA kaj de aliaj Esperanto-organizaĵoj.

Pliajn klarigojn volonte donos la Centra Oficejo de UEA.

Renato Corsetti

Cetere, ni transdonu la parolon al niaj intervjuitoj mem, reproduktante almenaŭ karakterizan parton de iliaj eldiroj.

Reprezentantoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj:

IRANO: d-ro Said Rajaie, ambasadoro: "Kun granda intereso mi atendas la enkondukon de Esperanto en Unuiĝintajn Naciojn. Tio signifos grandan paŝon antaŭen, ne nur en la komunikado sed aparte sur la kultura kaj psikologia terenoj; ĝi signifos la egalecon de ĉiuj membroj."

JUGOSLAVIO: s-ro Ignac Golob, speciala sendito: "La enkonduko de Esperanto signifus progreson sur kultura kaj politika kampo. Sed por tion atingi, pli intensa informado estas necesa. Ankaŭ la popularigo de Esperanto en la nealiancitaj landoj estus grava helpo."

KUBO: s-ro López del Amo, ministro: "Estus mirinde, se ni ĉiuj povus interkompreniĝi en unusola lingvo, apartenanta al ĉiuj egale. La tradicio kaj la inercio estas la plej grandaj obstakloj, sed oni povas venki ilin per energia agado kaj pacienco. José Martí, la granda kubano, diris: 'Patrujo estas la homaro.' Ni povas nur varme bonvenigi ĉion, kio kontribuas al la unueco."

MAŬRITANIO: s-ro Rasim Bá, konsilanto: "Kvankam mi ne multon scias pri Esperanto, mi estas certa ke ĝi povus multe kontribui al la internaciigo de nia laboro kaj niaj rilatoj. Ĉiuj reprezentantoj devus tuj komenci lerni ĝin. Mi mem volonte eklernus ĝin tuj."

NEPALO: s-ro M. Bhat, konsilanto: "Mi certe subtenos la enkondukon de Esperanto, ĉar nun ni uzas alies lingvojn, per kio ni libervole akceptas malavantaĝon en ĉiu diskuto. Sed alternativon ĝis nun ni ne havis."

PAKISTANO: s-ro Ibnul Hasan, ĉefredaktoro, membro de delegacio: "Lingvo estas tre grava faktoro en la identeco de iu popolo. Tial Esperanto povas havi estontecon kiel universala interkomprenilo kaj komunikilo, tamen ne kiel alternativo por nacia esprimilo."

SIERALEONO: s-ro Abdul G. Koroma, ambasadoro: "Estas ekster dubo, ke ni bezonas komunan interkomprenilon, kiu egaligos la homojn. Nur interparolo sen interpretistoj povas krei atmosferon de intima amikeco inter diversnaciaj homoj. Ni ĉiuj, sed precipe la malgrandaj nacioj, devas kontribui al la enkonduko de Esperanto."

EKVATORA GVINEO: s-ro Carmelo Nvono, ambasadoro: "La grandaj monsumoj uzataj de la internaciaj institucioj por interpretado kaj tradukado kreas konstantajn miskomprenojn kaj tiu mono povus esti utiligata pli konvene por la bono de la homaro. Tial la enkonduko de unusola oficiala lingvo, neŭtrala kaj facile lernebla, kiel Esperanto, havus grandan signifon."

SUDANO: s-ro A. Elfaki, ambasadoro: "Neniu povus kontraŭi tiel mirindan ideon, ke la homoj de la mondo povu interkompreniĝi per unusola lingvo, sur egalrajta, tuthoma nivelo. Jam estas tempo, ke ni ekparolu pri la lingva diskriminacio al kiu la plejmulto el ni estas submetita. Kalkulu kun ni!"

ZAMBIO: s-ro M. Kaunda, konsilanto: "La granda avantaĝo de Esperanto estas ke ĝi ne altrudas al la malgrandaj popoloj alies kulturon, sed permesas liberan evoluon de ĉies lingvo kaj kulturo. Ĝia kontribuo al la unuigo de la homaro povas superi ĉiujn niajn revojn."

BANGLADEŜO: s-ro E. Sobhan, ambasadoro: "La angla lingvo estas vaste uzata ne nur en Unuiĝintaj Nacioj sed ankaŭ aliloke, kaj tio absolute sufiĉas. Vojaĝante tra la mondo mi konstatis, ke gejunuloj dudekjaraj ĉie en la mondo scipovas la anglan. Do, se vi volas kontribui al la internacia interkompreniĝo, propagandu la anglan lingvon."

ZIMBABVO: s-ro E.K. Mashigaidze, ambasadoro: "Mia lando estas malfermita al interhoma kompreni-

INFORMADO:

Bona kaj malbona ekzemploj

THE TIMES, la mondrenoma londona ĵurnalo kiu starigis plurajn modelojn de la nuntempa ĵurnalismo, en sia numero de la 11a de decembro 1981 aperigis ampleksan artikolon pri Esperanto. Tiu pli ol milvorta teksto de Henry Bilbrough tre pozitive traktas Esperanton kiel rimedon por venki la ŝtatajn kaj ideologiajn limojn kaj barojn. Ankaŭ la faktoj uzitaj en la teksto estas ĝustaj, kaj la ekzemploj estas freŝdataj. Ĉio kune, temas pri plurrilate modela teksto per kiu la fama ĵurnalo starigas ankaŭ la modelon, kiel informi pri Esperanto. Ĉu *The Times*, tamen, faris unu erareton? Jes, ĝi faris. Tio estas la indiko fine de la artikolo, laŭ kiu la aŭtoro estas membro de Esperanto-Asocio de Britujo. Ĉu necesis tiu indiko? Ĉu la ĵurnalo devis konfesi al ni, ke ĝi komisiis la verkadon de tiu teksto, ne al iu hazarda ĵurnalisto scianta nenion pri la temo, sed ĝi donis la komision al homo, kiu bone orientiĝas sur la prilaborita tereno? Nu, ni ankaŭ atendis ĝuste tian konduton de *The Times* kaj ni estus surprizitaj, se ĝi estus aginta alimaniere.

Kvinoble pli ampleksa teksto pri Esperanto aperis en *NRC Handelsblad*, unu el la plej grandaj nederlandaj ĵurnaloj, kiu en la numero de la 28a de novembro dediĉis tutan paĝon al la Internacia Lingvo. Tie la ĵurnalisto Rudie Kagie, sub la titolo "Kion oni ja havas kontraŭ Esperanto", montras sian tutan analfabetecon pri la temo, sian tutan malkapablon elekti la ĝustajn el la multaj faktoj, kiujn liveris al li pluraj intervjuitoj. El la tuto ŝajnas, ke Kagie ricevis komision verki – spite al ĉio kion li aŭdos kaj malgraŭ ĉiuj konkludoj el siaj esploroj – malfavoran prezenton de Esperanto. Se tio efektive estis lia komisio, la ĵurnalisto brile sukcesis, li efike misgvidis sian legantaron. Tion oni konstatas ankaŭ el pluraj protestleteroj, kiuj venis al la adreso de *NRC Handelsblad* kaj parte aperis poste en ĝi.

ĝo, kaj ĝi certe subtenos ĉiun klopodon favore al Esperanto. Eble tiu aŭ alia kontraŭos la ideon, sed tio estas natura. Ni ne estas ĉiuj samtempe pretaj por akcepti iun novaĵon aŭ reformon, eĉ se ĝiaj utileco kaj bezono estas tute evidentaj."

Reprezentantoj ĉe Unesko:

AFGANIO: s-ro Rafi Samizay, ŝarĝito pri Unesko-aferoj: "Nun, sciante iom pli pri Esperanto, mi havos la eblon defendi tiun interesan kaj utilan ideon, kiam venos la okazo. Ĉar ni devas esti konsciaj, ke la uzo de iu nacia lingvo en internaciaj rilatoj alportas kun si ankaŭ la ideojn, antaŭjuĝojn kaj miskonceptojn ligitajn al la koncerna lingvo. La uzo de iu nacia lingvo signifas diskriminacion: avantaĝojn por iuj, malavantaĝojn por aliaj."

ALĜERIO: s-ro Abdelatif Rahal, ambasadoro: "La nuna kaosa stato pri la lingva problemo en la internaciaj organizaĵoj ŝuldiĝas al la konkurenco inter la plej potencaj nacioj por altrudi sian lingvon kaj tiel akiri plian avantaĝon. Esperanto, kontraŭe, ne altrudas sin sufiĉe forte, ĉar ĝi ne havas ian kaŝitan intencon. Tamen ĝiaj avantaĝoj estas evidentaj. Ĝia enkonduko helpus la malgrandajn naciojn kaj etnajn grupojn konservi sian kulturan identecon. Tio signifus por ni duan liberiĝon, la kulturan senkoloniiĝon."

CENTRAFRIKA RESPUBLIKO: s-ro Gaston Azibolo, ŝarĝito pri Unesko-aferoj: "En Esperanto mi vidas ĝian pli vastan, tutmondan projekcion, sen limoj kaj sen rivalecoj. La iniciato enkonduki ĝin en la movadon de nealiancitaj ŝtatoj estas bonega, kvankam la afero ne devas halti tie."

Misprezentaj simboloj: Antaŭ la sidejo de UN en Nov-Jorko naciaj flagoj flirtas samnivele – ene de UN naciaj lingvoj spertas malegalecon kaj diskriminacion.

EBURA BORDO: s-ro Anouma R. Pierre, konsilanto de la ambasado: "La granda avantaĝo de Esperanto estas, laŭ mia opinio, ke ĝi ne altrudas al siaj uzantoj iun eksteran kulturon, sed permesas al ĉiuj evoluigi libere siajn proprajn lingvon kaj kulturon, kaj uzi Esperanton kiel praktikan komunan laborilon. Sen ia dubo valorus enkonduki ĝin en la internacian uzon, eĉ se komence nur eksperimente."

EGIPTIO: d-ro Chams El-Dine El-Wakil, ambasadoro: "Pro ĝia universaleco mi estimas Esperanton. Mi deziras kuraĝigi kaj helpi vin, kiuj laboras por tiu nobla ideo. Eble vi trovos iom da rezisto ĉe la araboj, kiuj tre fieras pri sia lingvo. Sed tiu rezisto malaperos kiam ili konsciiĝos, ke Esperanto celas kunligi la parolantojn de la araba kun la tuta homaro."

GABONO: s-ro Agustin Ze Mezui, konsilanto: "Esperanto jam pruvis sian vivokapablon en multaj formoj. Pro tio valorus elprovi ĝin ankaŭ kiel interkomprenilon en la grandaj internaciaj organizaĵoj kiel UN, Unesko kaj tiu de la nealiancitaj landoj."

GANAO: s-ro Josef Adusei, konstanta vicreprezentanto: "Kompare kun provo de afrika lingvo mi multe pli estimas la ideon enkonduki Esperanton en ĉiujn kontinentojn, ĉar ĝia celo estas kunligi ĉiujn homojn per reciproka interkompreniĝo."

HINDA UNIO: s-ro L. Rahman, ambasadoro: "En internaciaj institucioj ekzistas konstanta rivaleco inter la grandaj lingvoj, kiu forprenas multe da tempo kaj mono. La apero de Esperanto en tiu areno povus fini tiun staton, ĉar multon oni povus diri favore al Esperanto kiel neŭtrala laborlingvo en internaciaj rilatoj."

INDONEZIO: s-ro Achjani Atmakusuma, ambasadoro: "Ni devas rekoni, ke la adopto de komuna neŭtrala lingvo kiel Esperanto alportus profundajn ŝanĝojn ne nur en la sistemo de kunvenoj, sed ankaŭ en la homaj rilatoj inter la diverslandaj delegitoj. . . Per la adopto de unusola lingvo grandaj monsumoj liberiĝus kaj estus uzeblaj por solvado de aliaj pli gravaj problemoj."

JAMAIKO: s-ino Elaine Melbourne, anstataŭa konstanta delegito: "Ĉiu protesto kontraŭ la angla kaj franca lingva ŝovinismo ŝajnas krio de eta knabo en la dezerto. Tamen nun, kiam la grandaj internaciaj organizaĵoj ekstudis serioze ĉiujn aspektojn de internacia komunikado, ni esperu, ke ili memoros pri la ekzisto de Esperanto kaj ĝiaj vastaj ebloj por ĉesigi la tension en la interhomaj rilatoj kreitan de lingvaj baroj."

KUBO: s-ino Rita Solis Ferreiro, ŝarĝito pri Unesko-aferoj: "La ideo de Esperanto estas bona. . . Ĉiuokaze plej urĝe bezonas ĝin la movado de nealiancitaj landoj, kaj eble ĝi estos ankaŭ la unua por adopti ĝin, ĉar ĝi estas libera de profundaj antaŭjuĝoj pri lingva supereco. Post ĝi verŝajne sekvos Unesko kaj UN."

NIGERIO: s-ro M.M. Musa, konsilanto: "La konkurenco inter la grandaj lingvoj en la internaciaj organizaĵoj alvenis al la punkto kiam lingva kaoso minacas.

Tial la ideo pri enkonduko de Esperanto venas en la ĝusta momento."

PERUO: s-ro Luis Felipe Alanco, ambasadoro: "La ideo de Esperanto estas tiel simpla kaj tiel perfekta, ke al multaj ĝi ŝajnas utopio. Tamen ĝi estas la sola lingvo kiu povas kontraŭstari al lingva imperiismo de la grandaj lingvoj."

RESPUBLIKO JEMENO: s-ro Abdul Rahman Al-Haddad, ministro: "La adopto de tiu internacia lingvo flanke de la movado de nealiancitaj landoj estas tre oportuna, des pli ke tiu movado sin dediĉas al la kontraŭstaro al ĉiuspeca, do ankaŭ kultura, superrego de kelkaj potencaj nacioj, kaj luktas por ke la mondo ne konsistu el grandaj kaj malgrandaj nacioj, sed el egalrajtaj partneroj."

SINGAPURO: s-ro M. David Saul Marshall, ambasadoro, kaj f-ino Then Chen Chao, komisiito pri Unesko-aferoj: "En Singapuro ni havas grandan lingvan problemon, kaj parte la angla, parte la ĉina provas ĝin solvi. Tamen ni rekonas la lingvajn malfacilaĵojn en la internaciaj organizaĵoj, kaj ni sekvas kun atento la evoluon de diversaj ideoj tiurilataj."

TUNIZIO: s-ro Mustafa Masmoudi, ambasadoro: kvankam la multiĝo de lingvoj, kiuj altrudiĝas en la internaciaj organizaĵoj, kaj la tiurilataj malfacilaĵoj konstante kreskas, mi havas la impreson, ke oni persiste evitadis tuŝi tiun temon. Por lerni unu fremdan lingvon oni devas al ĝi dediĉi multe da tempo kaj energio. Estas evidente tial, ke unu komuna lingvo estas la solvo de la problemo. Mi ne sufiĉe konas Esperanton por povi pledi por ĝi. Tiurilate mi estas sen antaŭjuĝoj."

* * *

Jen nia unua rikolto. Ĉu ni haltu ĉe tio? Neniukaze, ĝi estas ja nur la komenco de io, kio povas malfermi novajn perspektivojn al nia Movado. Sed por tio ni bezonas pli da homoj kapablaj kaj sindediĉaj, pli da mona helpo. Pri aferoj tiurilataj bv. skribi al:

Mag. Tibor Sekelj
(B. Kidriča 15, YU-24000 Subotica, Jugoslavio)

ĈI-JARA KONGRESA LANDO:

Belgio ekzistas, belgoj apenaŭ

LA ŜTATO BELGIO, kiel ni konas ĝin nun, naskiĝis en 1830 per la apartiĝo el Nederlando, post mallonga, septembra revolucio, precipe en Bruselo.

Antaŭe, ĝi travivis ege mult-eventan historion, kiun karakterizis antaŭ ĉio la okupado fare de pluraj fremdaj potencoj: romianoj, burgundoj, aŭstroj, hispanoj, francoj, nederlandanoj, germanoj. Ofte oni nomas ĝin la batalkampo de Eŭropo.

Tiu tre speciala situacio parte klarigas kelkajn trajtojn de la karaktero de la loĝantoj de Belgio: ilia preskaŭ freneza amo de la libereco, ilia facileco adaptiĝi al ege malsimilaj vivcirkonstancoj, ilia manko de vera, profunda sento de civitaneco, ilia granda laboremo. Ili ĉiam estis devintaj kontraŭbatali iun, klopodi elturniĝi el malfacilaj situacioj, leĝe se eblas, kontraŭleĝe se necesas!

En 1831, Belgio iĝis konstitucia, unueca monarkio. La unua reĝo estis germana princo de granda, tre malnova familio: Leopoldo la Unua, kiu fondis la belgan reĝecon. Sekvis: Leopoldo la Dua, Alberto la Unua, Leopoldo la Tria kaj Baldueno la Unua, la nuna reĝo kaj alta protektanto de la 67a Universala Kongreso en Antverpeno.

En 1908, Belgio iĝis kolonia potenco, kiam Leopoldo la Dua cedis al la belga ŝtato "sian propran" afrikan teritorion (Kongolandon), kiu restis belga kolonio ĝis sia sendependiĝo en junio 1960.

Dum la mondmilitoj, Belgio denove estis batalkampo kaj ĝin okupis la germanoj dufoje dum kvar jaroj.

La nunan Belgion karakterizas evoluo de unueca al federala ŝtato. Ĉar fakte, belga popolo ne ekzistas, almenaŭ ne en la etna signifo de la vorto. Belgio estas ŝtato, ne nacio etne homogena. Ĝia loĝantaro apartenas parte al la latinida (la franclingvaj valonoj en la sudo), parte al la ĝermana (la nederlandlingvaj flandroj en la nordo) lingvogrupoj, kaj al tiu lasta apartenas ankaŭ la malmultnombraj germanlingvanoj en la orienta parto de la lando.

La lingva limo trakuras Belgion de nordoriento sudokcidenten, pasante sude de Bruselo. Ĝi estas leĝe fiksita kaj kelkloke disigas urbon aŭ vilaĝon en du lingvajn partojn. Tiuj estas leĝe konsideritaj dulingvaj komunumoj, same kiel la ĉefurbo Bruselo, kiu situas sur la flandra teritorio, havas franclingvan plimulton, sed estas leĝe dulingva. Pro diversaj, ege komplikaj historiaj kaŭzoj, Belgio estiĝis en 1830 kiel franclingva ŝtato. La konstitucio (unu el la plej liberalaj en la mondo) tamen agnoskis ankaŭ la nederlandan kiel oficialan lingvon.

Dum la unua jarcento de la ekzisto de Belgio, Valonio estis la plej riĉa parto de la lando, industria, komerce bonege organizita. Flandrio estis precipe agrikultura, ege malriĉa, ekonomie sensignifa, kulture subevoluinta, sen unueca lingvo pro la multnombraj fremdaj okupadoj. Krom la lingva kaj kultura malekvilibro, tiuj ekonomiaj diferencoj grandparte influis la evoluon de Belgio al ĝiaj nunaj strukturoj.

Iom post iom naskiĝis ĉe la flandroj – dum la romantika periodo en kiu la pasinteco estis kulto – pro instigo de verkistoj, muzikistoj, politikistoj kaj aliaj intelektuloj, konscio pri sia propra riĉega pasinteco, kiuń dokumentas katedraloj, belfridoj, urbodomoj,

Foto: G. Coolens



Malnova antverpena Borso: Konstruisto atentis detalojn.

miloj da mondkonataj pentraĵoj, altnivela mezepoka kaj renesanca muziko ktp. ktp.

Tre konata romano de Hendrik Conscience (prononcu: konsjans), *La leono de Flandrujo* (kies Esperanta traduko aperis en 1929), finiĝas per jenaj vortoj: "Flandro, kiu legis ĉi tiun libron, pripensu je la glororiĉaj faroj, kiujn ĝi enhavas, kio Flandrujo antaŭe estis, – kio ĝi estas nun, – kaj pli multe, kio ĝi estiĝos, se vi ne forgesos la sanktajn ekzemplojn de viaj pra-avoj!" Tiu romantika alvoko bone resumas la mensostaton ĉe la flandraj intelektuloj. De tiam komenciĝas malrapida, sed profunda kaj pacienca serĉo de propra identeco, kiun la popolo estis perdinta dum la jarcentoj de fremda okupado.

Dank' al la belga parlamenta sistemo, dekoj kaj dekoj da leĝoj iom post iom aperis kaj regulis la uzon de la nederlanda lingvo en la justico, armeo, administracio, en la privataj societoj (entreprenoj), en la instruado. Sed estas la granda leĝo de 1932, kiu definitive ordigis la lingvan situacion en Belgio, surbaze de la principo de unulingveco en ambaŭ regionoj kaj dulingveco en la ĉefurbo Bruselo.

La konsekvencoj de tiu evoluo – kiu trovas sian lokon en la monda kunteksto de konsciiĝo pri propra identeco – nun kondukas la unuecan Belgion al federaciigo de la politikaj strukturoj. Ekde la komenco de 1982, tiuj strukturoj konkretiĝas jene: la centra registaro (dulingva) estras la komunajn, unuecajn sektorojn de la lando, kaj la regionaj registaroj prizorgas la regionajn sektorojn.

Ĉio ĉi tamen estas ege komplika sistemo, kiu daŭre evoluas kaj neeviteble naskas multajn konfliktojn pri kompetenteco kaj respondeco. Kio ja estas nacia? Kio regiona? Kio apartenas al ambaŭ?

La nova leĝa strukturo de Bruselo ankoraŭ ne estas fiksita. Tio en Belgio estas emocie la plej ŝarĝita, tikla kaj eksploda dosiero, pri kio oni eble trovos solvon antaŭ la venontaj komunumaj elektoj en oktobro de ĉi tiu jaro.

Tian politikan evoluon la belgoj nun travivas. Ĝi ne estas haltigebla, ĉar ĝi enradikiĝas, – kiel jam dirite –, en tre profunda, mondvasta fluego. Ĉie en la mondo oni serĉas novan ekvilibron inter la unuecaj kaj regionaj politikaj tendencoj, ĉie oni konsciiĝas pri identeco kaj aŭtentikeco. Tiu evoluo transiras la nurajn lingvajn problemojn kaj tuŝas ĉiujn aspektojn de la homa vivo, la fundamentajn sociajn konceptojn.

E. Symoens

Kongresa Komuniko

67a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Antverpeno (Belgio) 1982 07 24-31

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Adreso de LKK: Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Honora Komitato. Lastatempe anonciĝis la konsisto de la Honora Komitato de la 67a UK: Daniel Coens, ministro pri nacia edukado (nederlandlingva); A. Daelemans, ĝenerala direktoro de la Nacia Sekretariato de la Katolika Instruado; Christian de Duve, profesoro de biokemio ĉe la Katolika Universitato de Loveno (franclingva), Nobelpremiito en 1974; Jean Defraigne, prezidanto de la Ĉambro de Deputitoj; J.F. Geeraerts, direktoro de la Reĝa Societo pri Zoologio de Antverpeno; Marcel Hoebeke, konstanta sekretario de la Reĝa Akademio pri Nederlanda Lingvistiko kaj Literaturo; A. Kinsbergen, guberniestro de la provinco Antverpeno; Mathilde Schroeyens, urbestrino de Antverpeno; Michel Tromont, ministro pri nacia edukado (franclingva).

Senpaga partopreno por IJK-anoj malpli ol 26-jaraj. La Estraro de UEA kaj la Loka Kongresa Komitato akceptis proponon, ke junaj anoj de la 38a Internacia Junulara Kongreso (IJK) rajtu partopreni senpage en

la 67a Universala Kongreso. La gejunuloj ricevos nur la kongresan insignon, ne la kongresajn dokumentojn. Gejunuloj, kiuj volas profiti ĉi tiun unikan elpaŝon, nepre indiku sian naskiĝdaton, kiam ili aliĝos al la IJK.

19a Internacia Infankongreseto. Pasintan monaton ni – iom heziteme – anoncis la esperon efektivigi infankongreseton en Antverpeno. Feliĉe, la planoj kaj perspektivoj tiurilate nun bone maturiĝas, kvankam LKK certe bonvenigos pliajn sinproponojn de homoj, kiuj pretas kunlabori en la infankongresejo dum la kongresa semajno. Anoncu vin jam nun se vi volas helpi.

Tago de la Lernejo. Unu el la plej gravaj – kaj novaj – eroj en la ĉi-jara programo estos la Tago de la Lernejo. Estas planita trio da matenaj prelegoj pri "Studado de dua lingvo", "Metodiko en la praktiko", kaj "Esperanto-ekzamenoj kiel finpunkto en la lernado". Posttagmeze oni starigos serion de modellecionoj, prezentos "Lingvolernadon per komputilo" kaj gvidos podian diskutadon.

Postkongresa ekskurso. Unuiĝo Franca por Esperanto en kunlaboro kun UEA aranĝas sestagan postkongresan ekskurson tra Francio, kiu finiĝos per dutaga restado en Parizo, antaŭ ol reveni al Antverpeno. Ekskursantoj vojaĝos en aŭtobusoj kaj estos profesie gvidataj de Esperanto-parolantoj.

Dumkongresaj ekskursoj. LKK preparas aparte riĉan programon de ekskursoj dum la kongresa semajno, inkluzive de trahavenaj ŝipveturadoj. Laŭtradicie la merkredo estos dediĉita al tuttagaj ekskursoj, sed estos eble ekskursi duontage dum la cetero de la semajno.

Triamondanoj. Sekve de iniciato de la Komisiono pri Landa Agado, tre agrabla metodo ekzistos por kontribui kaj finance kaj morale al la Fondaĵo Azio-Afriko. En la kongresejo vendiĝos Esperantaj poŝtkartoj (sur kiujn oni povos glui la porkongresan poŝtmarkon!) por sendi salutmesaĝojn al homoj en la tria mondo, kies adresojn liveros la Komisiono. La profito de tiuj vendoj iros al la Fondaĵo Azio-Afriko.

Karavanoj. Al la listo de anoncitaj karavanoj ni povas aldoni tiun de la Esperanto-Centro, Postfach 1450, D-4790 Paderborn, FR Germanio.

Statistiko. Lastatempe venis lavango da aliĝiloj, kiuj duobligas la pasintmonatan nombron de la kongresontoj. El 43 landoj aliĝis 921 gekongresanoj ĝis la mezo de januaro. Unualoke troviĝas Nederlando (154); sekvas Belgio (134) kaj FR Germanio (128). El pli foraj landoj ni menciu Usonon (23), Brazilon (18), Japanion (13), Korean Respublikon (8) kaj Aŭstralion (4).

ANKORAŬ PRI GENERACIAJ ASPEKTOJ DE LA MOVADO:

Mezaĝuloj mankas, ĉar ni proponas nenion al ili

HUMPHREY TONKIN en sia artikolo "Generaciaj aspektoj de la Esperanto-movado" (ĉi tiu revuo, oktobro 1981) starigas multajn demandojn. Al kelkaj el ili mi volas respondi, ĉefe al tiuj, kiuj koncernas la generacion de maljunuloj/emeritoj.

Dum pluraj jaroj mi estis ĉefredaktoro de por-maljunulara magazino; en tiu funkcio mi spertis multajn mirigajn kaj admirindajn aktivadojn kaj multe lernis pri la amindaj ecoj de gemaljunuloj en industria lando.

Tonkin i.a. rezonas pri plendoj, ke en la E-movado estas tiom da maljunuloj, dum ne aktivas la mezaĝuloj. Li mem aludas la kialon. Ne estas ĝuste, ke mankas mezaĝaj esperantistoj, sed estas ĝuste, ke esperantistoj kutime aktivas dum junaĝo sed paŭzas dum du aŭ tri jardekoj de la streĉa profesia vivo kaj reaktiviĝas nur dum la post-labortempa fazo, do kiel emeritoj – se ĝis tiam entute ili iagrade restis fidelaj al Esperanto. La kaŭzo por ĉi tiu – el la vidpunkto de la E-movado – sendube malbona paŭzado tamen troviĝas ĉefe en la E-movado mem. Ĉar, escepte de kelkaj profesioj (ekz. instruistaj), preskaŭ neniu vere havas utilon per Esperanto dum sia profesia laboro. La Movado mem preskaŭ tute ne donas tiajn praktikajn utilojn, kaj ankaŭ ekster la Movado estas nur ege malmultaj ebloj, iamaniere utiligi la Internacian Lingvon, ĉu por profesiaj celoj, ĉu por privataj interesoj. Se oni pensas pri la pli-malpli ridinda stato de la plimulto de la tielnomataj fakaj organizaĵoj, oni tuj vidas la verajn mankojn: Ne mankas la esperantistoj mezaĝaj, sed mankas motivoj por ili, uzi kaj uzadi la lingvon. Mankas ĉiaj premisoj por tia uzado, de koncerna literaturo ĝis fakaj kongresoj.

Kompreneble, pro tio perdiĝas tre multaj personoj el la Movado, kiuj dum junaĝo estis aktivaj kaj fervoraj, unue, ĉar ili havis tempon, due, ĉar al gejunuloj la Movado malfermas pordojn al la vasta mondo, kio por ili estas jam profito tre granda. Mi do ne havas la impreson, ke la problemo de la Movado estas la rekrutado de junaj esperantistoj.

Same, ne estas problemo la maljunuloj. Certe, eĉ se perdiĝas tre multaj dum kaj pro la paŭzado, la resto des pli fervore reaktiviĝas, havante kutime sufiĉe da tempo kaj mono, por nun ĝui la Movadon tian, kia ĝi estas: Turismi dum kongresoj kaj ĉe aliaj okazoj, korespondadi kaj konsumi literaturon.

El miaj spertoj kiel ĉefredaktoro de por-maljunulara magazino mi konkludas, ke la E-movado eĉ tro malmulte atentas ĉi tiun aĝogrupon. Dum la lastaj jardekoj estiĝis multaj ebloj kaj okazoj por emeritoj, aktivadi ankaŭ mense kaj cerbe; oni eĉ havas en pluraj landoj apartajn altlernejojn aŭ universitatojn speciale por maljunuloj. Amase maljunuloj (re)lernas fremdajn

Pliaĝuloj ofte estas la granda plimulto en niaj kongresoj: Ĉu la kongresa programo atentas iliajn specifajn dezirojn kaj bezonojn?

lingvojn – sed neniam mi ĝis nun aŭdis, ke iu esperantisto celkonscie aliris ĉi tiun potencialon por la E-movado. Kial oni ne aranĝas E-kursojn speciale por ili, en hejmoj kaj kluboj de maljunuloj? Estas facile konvinki ĉi tiujn homojn pri la valoroj de la Internacia Lingvo, pri kiu ofte ili memoras ankoraŭ de la tempo antaŭ la dua mondmilito. Esperanto en eĉ pli alta grado ol naciaj lingvoj taŭgas por trejni la maljuniĝantan cerbon (grava postulo de l' gerontologio) kaj havas la grandan avantaĝon, ke (la psikologie grava) sperto de sukceso ekestas multe pli rapide ol ĉe naciaj fremdlingvoj.

Antaŭ kelka tempo hazarde mi havis la ideon, verki tiuteman artikolon por la gazetara servo de koncerna germana instituto (Kuratoraro de Helpo por Maljunularo); la estrino entuziasme respondis, ke oni metos la artikolon tuj en la sekvontan eldonon de la gazetara servo, kaj aldonis: "Ĝi estas verkita tiel motivite, ke min rekte kaptis la emo, mem lerni Esperanton. . .". Ĉiukaze oni vidas, ke tiu fakulino ankaŭ tuj komprenis, kian grandan ŝancon Esperanto povas havi en la maljuna generacio. Kaj inverse: Ŝi same tuj komprenis, kia ŝanco troviĝas en Esperanto por ĉi tiu generacio.

Mi do konsilas al ĉiuj: Nepre aliru ĉi tiun grupon, ĉar jen estas vere granda potencialo por la E-movado. Tonkin prave demandas, ĉu Esperanto ne povas multe utili al tiuj personoj. El miaj spertoj mi nur povas emfaze jesi ĉi tiun demandon kaj aldoni, ke bedaŭrinde ĝis nun ni ne sufiĉe profitas de tiu ŝanco, kvankam estus simple kaj promesdone.

Sed mi ankoraŭfoje revenu al la ĉefa problemo, konstatita ankaŭ de Tonkin: Kiel malhelpi pasiviĝon de esperantistoj de la mezaĝo? Kompreneble, tio estas tre kompleksa afero. Tial mi limigas min al unu, laŭ mi centra aspekto.

Kiel mi jam supre aludis, laŭ mia opinio – kaj ĝi ne estas sole mia – ni sukcesos en pli longa perspektivo ligi ĉiujn aĝogrupojn al Esperanto (mi ne diras al la Movado!) nur, se oni povas profiti de ĝi tute praktike, ordinare, normale en ĉiutaga kaj profesia vivo. Sed por tio ĝis nun mankas ja preskaŭ ĉiuj premisoj; pri iuj el tiuj mankoj certe ne kulpas la Movado, pri aliaj jes. Certe la esperantistoj kulpas pro tio, ke ili ne sufiĉe konscias pri ĉi tiu manko kaj do ankaŭ ne provas forigi ĝin.

Unu el tiuj premisoj estas, ekzemple, koresponda universitato (kiu je mia miro nun estas menciita en la laborplano por la 100-jara jubileo de Esperanto), ĉar ĝi povus dum nur malmultaj jaroj krei bonajn kondiĉojn por dekomenca profesia utiligo de Esperanto. (Cetere, en tia universitato povas studi ankaŭ gemaljunuloj – vidu supre!) Similan korespondan lernejon oni devus krei ankaŭ por metiistoj kaj faklaboristoj. Konsekvence oni devus multe pli akceli kaj prosperigi la fakajn organizaĵojn. Entute oni devas krei veran fakan literaturon en Esperanto, sisteme.

Kaj, por mencii kroman, tamen lastan punkton, mi ne komprenas, kial ni tiom malmulte demonstras la pontan funkcion de Esperanto. Por doni konkretan ekzemplon: Centoj da esperantistoj ĉiujare vojaĝas tra multaj landoj kaj prelegas antaŭ – ĉefe aliaj esperantistoj. Kial nur antaŭ esperantistoj? Kial ne por pli vasta publiko neesperantista? Kial ĉiuj niaj E-kongresoj estas nur por esperantistoj, se ili enhavas tre multajn programerojn interesajn ankaŭ por neesperantistoj? Eĉ en samtempa interpretado Esperanto estas supera al ĉiuj naciaj lingvoj – do, kial ni ne demonstru tion? Sufiĉas ja, se ni ĉiam tradukas nur por la loĝantoj de la koncerna lando en ties lingvon. Kian bonegan impreson pri la utilo kaj valoro de Esperanto donas tio, mi spertis mem dum prelegvojaĝo tra Japanio. Tia praktika demonstro estas pli bona propagando ol la plej lerta teoria prelego pri Esperanto.

Nu, tutcerte ĉiu el ni trovos multajn aliajn eblojn, kiel forigi ĉi tiun "mezaĝan truon" de la E-movado, se ni nur sobre ĉirkaŭrigardas, observas la verajn interesojn de la homoj kaj faras la ĝustajn konkludojn.

Stefan Maul

MANUSKRIPTOJ:

Ĉu perdiĝis la traduko de *Milito kaj paco*?

"SURBAZE de miaj esploroj mi volas konatigi la legantaron de *Starto* pri la kompilita listo de manuskriptoj, kiuj atendas eventualan eldonon. Mi konscias, ke la listo ne estas kompleta kaj volonte akceptos ĉiujn informojn, kiuj povos kompletigi kartotekon de la manuskriptoj (aŭtoro, nomo de la verko, tradukinto, loko kie troviĝas la manuskripto, aliaj gravaj indikoj). La laŭeble kompleta listo de manuskriptoj estos grava informfonto ne nur por la tradukantoj, sed ankaŭ por la eldon-komisiono de ĈEA ĉe decido pri la 5-jara eldona plano." Tiel skribas V. Novobilský en la organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, *Starto* (1981/4), enkonduke al impona listo de tradukoj de verkoj de dek sep ĉeĥaj aŭtoroj kaj originalaĵoj de Kořínek, Omelka, Pič, Urban kaj Urbanová.

Ne nur en Ĉeĥoslovakio kuŝas manuskriptoj, kiuj meritus fojan eldonon. Aliajn konservas la konataj movadaj bibliotekoj kaj ankaŭ kelkaj unuopuloj. Tamen, iuj manuskriptoj atingas nek eldoniĝon nek sekuran deponejon, sed simple perdiĝas. Tiel ŝajne okazis, ekzemple, pri tradukoj de *Milito kaj paco* de Tolstoj kaj *Fratoj Karamazov* de Dostojevskij, kiujn faris Ivan Širjaev. Ni esperu, ke pli bonan sorton havis la postlasaĵoj de S.G. Rublov (i.a. *Malvivaj animoj* de Gogol) kaj de K.M. Gusev.

Tradukoj el la rusa formas tre grandan parton de la manuskripta kolekto de Biblioteko Hodler de UEA. Pri tio respondecas unu homo, la ruso Dementy Pavlovitsj Staritsky (1891-1962), kiu enmigris Nederlandon en 1923 kaj iom poste edziĝis al Nelly Sevenhuijsen – kunfondinto, kun la patro, de la Esperanto-grupo en Haarlem – kun kiu li jam de jardeko korespondis. Pro reguloj rezultintaj el la granda tiama senlaboreco, ekde 1932 nur unu ano de la paro rajtis perlabori salajron, kaj ĉar la edzino kiel instruisto ĉiam ĝuis pli bonajn enspezojn, la edzo akceptis la tiam tre nekutiman rolon de dommastrumanto. Li ĝin plenumis bonege, kaj okupis sian liberan tempon per tradukado.

Nur du tradukaĵoj de Staritsky, ne tre ampleksaj, trovis ĝis nun libroformon: *Kiso de la reĝino* de I.F. Naĵivin (1950) kaj la ankoraŭ havebla *Kaŭkazaj rakontoj* de Miĥail Lermontov (1964; 5,00 guldenoj ĉe UEA). Inter la pli ampleksaj el la neeldonitaj tradukaĵoj en Biblioteko Hodler estas *Songo de Onĉjo* kaj *Orfino (Netoĉka Nezvanova)* de Dostojevskij, *Nobela nesto* de Turgenev, *Haĝi Murat* de Tolstoj, *Memuaroj* de A.L. Tolstaja, *Framasono* de M. Osorgin, *La fera torento* de A.S. Serafimoviĉ, *La blinda muzikisto* de V.G. Korolenko, *La tombo de soldato* de U.A. Aldanov, *Dek ĉevalpovoj* de Ilja Ehrenburg (ŝajne nefinita), kaj tri longaj historiaj romanoj de D.S. Merejkovskij: *Renaskiĝintaj dioj* (pri Leonardo da Vinci), *Juliano apostato* kaj *Antikristo; Petro kaj Aleksej (Taglibro de la carido Aleksej)*. Krome troviĝas malpli longaj verkoj de Ĉeĥov, Gogol kaj aliaj. Iuj el la tradukoj estas tajpitaj, aliaj en manskribo – la manskribo, se diri honeste, de homo alkutimiĝinta al tajpado.

Rigardante al pli fruaj, multe pli belaj manskribaĵoj – precipe tiuj de la konata verkisto H.J. Bulthuis (1865-1945) – oni devas iom bedaŭri, ke la skribmaŝino inventiĝis. Biblioteko Hodler konservas la plenan tradukon, kiun faris Bulthuis, de *Don Quijote*, kiun poste, multe pli kompetente, elhispanigis Fernando de Diego. Alia granda traduko de Bulthuis, ĉi-foje el la angla, estas *La bela dio aŭ La lasta el la 'tzinoj; Rakonto pri la konkero de Meksiko* de Lew Wallace, usona romanisto kies pli fama verko estas la kristepoka rakonto *Ben Hur*. El sia propra lingvo, la nederlanda, Bulthuis tradukis *Mi kaj mia muzikisto* de Aart van der Leeuw. Sed la plej valora el la trezoroj, kiujn li postlasis al la Biblioteko, estas la multe prinotita ellatinigo de la majstroverko de la plej fama roterdamano, Desidero Erasmo, *La laŭdo de la malsaĝeco*.

La vienano Karl Cron, pri kiu silentas la movadaj historioj, en la dudekaj kaj tridekaj jaroj sendis al UEA verkojn de Schiller, Schopenhauer, Theodor Storm kaj aliaj el la germana. Konserviĝis ankaŭ lia letero de oktobro 1930, kiu iel signas la finon de la manskriba epoko: "Fine mi demandas ĝentile, ĉu UEA ne scias la adreson de vendejo de **skribmaŝinoj**, kiu liveras tiajn maŝinojn ankaŭ kun literaro **Esperanta**. Nome, pro malakrevido promaljunaĝa. . .".

La menciitaj titoloj neniel elĉerpas la manuskriptaron de Biblioteko Hodler. Mankas spaco por mencii ĉiujn, sed sciu almenaŭ pri la romanego de Victor Hugo *La mizeruloj*, esperantigita de sep francoj en la tridekaj jaroj; diversaj studoj, sliparoj, gazeteltranĉaĵoj ktp. de Petro Stojan, kiu iam laboris ĉe la ĝeneva UEA; *Blasfemoj*, novelaro de Andreo Szabó; du teatraĵoj de Bukar; diversaj verkoj de Julia Pióro; verkoj proponitaj por Belartaj Konkursoj ekde 1965 (inkluzive la romanojn, kiuj aspiris Premion Schwartz); prelegoj de Internacia Kongresa (antaŭe Somera) Universitato ekde 1977; akademiaj korespondaĵoj de Walter Lippmann, 1921-1937; kaj korespondaĵoj inter Kalocsay kaj Waringhien, 1927-1970.

Kiel dirite, ankaŭ kelkaj unuopuloj konservas ĉe si manuskriptojn, ne nur de propraj verkoj. En la hejmo de William Auld troviĝas la rimarkinda religia eposo *La Uranogedio* de Johano Ricci (kies specimeno aperis en *Esperanta antologio*); *Bildoj pri norda lando*, novelaro de Sen Rodin; la ŝekspira komedio *Mildigo de megero* en traduko de Gerald C. Jervis; kaj *La sekreta psiko*, erotika sonetaro – parencverko de *Sekretaj sonetoj* de Peneter – de iu Eva Sveti Vrag.

Eldonistoj, ĉu vi interesiĝas pri iuj el la menciitaĵoj? Posedantoj de manuskriptoj, ĉu vi ne ŝatus transdoni ilin por konservado al Biblioteko Hodler?

Charles R.L. Power

Vendejo kun 43 000 libroj

KIAM saldiĝos la kontoj por la jaro 1981 – tio ja baldaŭ okazos – ni konstatos, ke la vendoj de la Libroservo de UEA en la pasinta jaro superis la sumon de 240 000 guldenoj. Tio estas je 80 000 guldenoj pli alta vendosumo ol en 1980. La pozitiva diferenco ŝuldiĝas plejparte al la vere furora sukceso de *Plena analiza gramatiko* kaj al la vendoj dum la 66a UK en Brazilio.

La kutima jarfina inventaro en la Libroservo liveris kelkajn aliajn interesajn nombrojn: Fine de 1981, la Libroservo havis proksimume 43 000 ekzemplerojn de 2 285 diverstitolaj libroj, gramofondiskoj, kasetoj kaj aliaj varoj. Ĉirkaŭ 5 000 ekzempleroj de la libroj ne apartenas al la Libroservo sed estas proprajo de aliaj eldonejoj, deponita kiel komisia stoko ĉe UEA. La 37 727 ekzempleroj de la varoj apartenantaj al UEA valoras ĉirkaŭ 175 000 guldenojn.

Se ni jam superŝutas vin per ciferoj de la inventaro, ni aldonu, ke ĝi estis okazo ankaŭ por konstati, ke la esperantistoj montras dubindan inventemon ĉe la elekto de konvenaj titoloj por siaj eldonaĵoj. Preskaŭ 300 librotitoloj en nia stoko komenciĝas per la litero E, dum K kaj S akaparas po 200.

Jen nun nia kutima listo de la pleje vendataj libroj dum la jaro 1981. Temas ankaŭ ĉi-foje nur pri la senrabataj vendoj, kio signifas, ke la liston ne influis niaj liveroj al la aliaj movadaj librovendistoj. En la listo estas indikitaj la nunaj vendoprezoj en guldenoj.

1.	*Plena analiza gramatiko* (Kalocsay, Waringhien)	48,00
2.	*Plena ilustrita vortaro* (Waringhien k.a.)	129,00
3.	*Ĉu li venis trakosme?* (J. Valano)	24,60
4.	*Esperanto en perspektivo* (Lapenna, Lins, Carlevaro)	84,00
	Lingvistikaj aspektoj de Esperanto (Wells)	12,00
5.	*La luzidoj* (Camões)	43,20
6.	*Praktika bildvortaro de Esperanto* (Watts)	13,50
7.	*Lidja Zamenhof* (Dratwer)	12,00
8.	*Esperanto and English Dictionary* (Wells)	13,80
9.	*Kiel diri. . . ?* (Lentaigne)	9,00
10.	*Joĉjo, la amiketo* (Otto)	8,10
11.	*Fabeloj de la verda pigo* (Beaucaire)	19,80
12.	*ABZ de amo* (I. kaj S. Hegeler)	33,00
13.	*La Sankta Biblio*	27,00
14.	*1887 kaj la sekvo. . . Eseoj IV* (Waringhien)	33,00
15.	*Plena vortaro* (Grosjean-Maupin k.a.)	26,40
16.	*Enciklopedio de Esperanto*	45,00
17.	*Lingvaj ludoj de GEJ*	8,40
	Paŝoj al plena posedo (Auld)	19,50
18.	*Per nia nura vol'* (Kasteiviva k.a.), kaseto	18,00
	Plena verkaro de Zamenhof (10 volumoj)	360,00
19.	*Doña Bárbara* (Gallegos)	16,20
	Mondo de travivaĵoj (Sekelj)	24,00
	Primico (Tagor)	10,50
20.	*Baza literatura krestomatio* (Benczik)	13,80
	Somermeze (Kuusberg)	13,80

Vi ne devus surpriziĝi, ke la nova libro de J. Valano *Ĉu li venis trakosme?* – troviĝas en la supro de la listo. Same, superfluas miro, ke *Fabeloj de la verda pigo* (Beaucaire) komforte eniris la liston de la furoraĵoj. Por ni, surprizo estas, ke *La luzidoj*, libro, kiu estas aĉetebla nur ekde oktobro ĉe nia Libroservo, elbatalis tiel altan lokon en la listo. Ankaŭ tio pruvas, ke niaj klientoj havas bonan guston kaj scias, kio valoras aĉeton. Simile estas pri la monumenta kolekto de *Plena verkaro de Zamenhof*, kies prezo nun postulas grandan investon, necesan antaŭ la baldaŭa elĉerpiĝo de la kolekto. Estas kuraĝige, ke la publiko komencas malkovri la kvaliton de du relative malnovaj eldonaĵoj, du majstraj tradukoj – *Doña Bárbara* kaj *Primico*. Bele surprizas ankaŭ la fakto, ke la nova tradukaĵo el la estona – *Somermeze* – sukcesis eniri la liston.

Multaj el vi scias, ke nia Libroservo en junio pasintjare enkondukis pli altajn pagojn por la sendokostoj (vidu la finan alineon de la rubriko "Laste aperis. . ."). Ni vere tre bedaŭras, ke la nederlandaj poŝtaj tarifoj devigis nin al tia paŝo. Multaj el niaj klientoj jam lernis, ke estas granda malavantaĝo mendi unu aŭ du malmultekostajn broŝuretojn kaj pagi la minimumajn sendokostojn. Por eviti malagrablan korespondadon pri tiu temo, nia konsilo estas, ke la klientoj kolektu siajn dezirojn kaj faru mendon nur kiam oni atingas sumon, kiu ekonomie pravigas la altajn sendokostojn. Tiel oni ŝparos al si monon kaj al ni laboron. Bonvolu memori, ke nia nova Katalogo aperos nur en 1983.

La plej granda movada librovendejo – je via dispono!

Bela kaj klara traduko

Apologio de Sokrato kaj **Kritono**, de Platono. El la helena trad. A. Goodheir (1911-). Glasgow: Kardo, 1981. 51p. 21cm. ISBN 0 905149 15 7. Prezo: 14,40 gld.

Platono (427-347 a.K.) estis disĉiplo de la granda helena saĝulo Sokrato (470-399 a.K.), kiu mem postlasis nenion skribitan. En siaj sokrataj dialogoj, kies scenejoj estas la atenaj gimnazio, stratoj kaj malliberejo, la poeto-filozofo gloras sian instrumajstron, kreinte verkojn de eterne brila beleco, de profundega vero.

En la jaro 399 antaŭ Kristo la atena demokrata tribunalo kondamnis al morto la sepdekjaran Sokraton pro kleriga kaj religia liberalismo. Oni rigardis lin kiel delogiston de la junularo. Kelkajn jarojn poste (ĉ. 392), Platono verkis *Apologio de Sokrato*, tri inter si rilatantajn pledojn, kiujn li enbuŝigas al sia instruisto.

Por tiaj pledoj ekzistis certaj, tiam de longe klišiĝintaj kondutmanieroj, kiuj fariĝis preskaŭ devigaj. Sokrato nun per sia konduto ŝajne respondas al la kutimo, sed samtempe li preskaŭ nepercepteble transformas la defendon en atakon, superŝutas siajn kontraŭulojn per akra ironio, pruvante ilian malican malklerecon, evidentigas, ke li, kiun oni akuzas pro ateismo, agas laŭ dia komisio, kaj finfine kulmine elmontras, ke li ne nur ne meritas la mortopunon, sed pli vere la honoron de ŝtata dumviva nutrado. Lia moraleco montriĝas ĉiel supera al la idearo de la aŭskultantoj, kiuj kutime orientiĝas laŭ la principoj de nura utileco.

En la evoluhistorio de la homa spirito *Apologio* prezentas ion kiel la naskiĝhoron de dio en la homo. Agnoskante la voĉon de la konscienco kiel dian gvidanton, Sokrato liberiĝas de la timo antaŭ la morto kaj gajnas neskueblan serenecon.

Tion klare montras ankaŭ la nur 13-paĝa dialogo *Kritono*. Tiu amiko ĉion preparis por liberigi Sokraton per subaĉeto el la karcero. Sokrato tamen montras al la amiko, ke estus malbone tiel agi. Li devas iri, li ne povas ne iri "la vojon laŭ kiu dio kondukas nin".

Oni povas konjekti, ke la samtempuloj de Sokrato apenaŭ komprenis liajn moralo-konceptojn. Por ili Sokrato estis krimulo. Supozeble nur malmultaj personoj povis sekvi liajn ideojn. Tiel revoluciaj ili tiam estis. Kaj ĝis hodiaŭ ili perdis nenion de aktualeco. Ĉiam denove troviĝas raraj karakteroj, kiujn neniaj minacoj, neniaj torturoj povas subigi. Ili sekvas la vojon, kiu estas tiu de ilia personeco. Eĉ la certa morto ne povas instigi ilin malkonfesi tion, pri kio ili konvinkiĝis. Kaj ĉiuj aliaj, kiuj, por savi vivon kaj sanon, cedas antaŭ la perforto, sentas tion kiel perdon de sia homa digno, ofte ne ĉesas suferi pro tiu perdo dum sia tuta plua vivo. La interna moraleco de la homo restas ne forigebla fakto, sufiĉe stranga fenomeno en nia moderna materialista mondo. Ĝi transcendas religiojn kaj konfesiojn, troviĝas same ĉe ateistoj, kiuj tiel sekvas "la vojon laŭ kiu dio kondukas".

Estas ĝojiga fakto, ke ambaŭ platonaj skribaĵoj nun ekzistas ankaŭ en Esperanto. Legante ilin tiel tradukitajn oni preskaŭ havas la impreson, kvazaŭ oni legus ilin en la helena lingvo, tiom bela, klara kaj simpla estas ilia lingvaĵo ankaŭ en Esperanto.

Rikardo Ŝulco (FR Germanio)

Kion vjetnamoj opinias

Vjetnama Socialisma Respubliko, de pluraj aŭtoroj. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo, 1980. 271p. Ilus. 19cm. Prezo: 9,90 gld.

Ankaŭ post la fino de la milito Vjetnamio restas lando daŭre interesa por eksterlandanoj. Mi eĉ dirus, ke por la veraj amikoj de Vjetnamio la lando estas pli interesa en la nuna momento, kiam ĝi klopodas reordigi sin kaj progresi en pluraj kampoj. Fariĝis normale, ke la grandaj inform-rimedoj ne interesiĝas pri ekstereŭropaj landoj, kiam ne okazas militoj, ribeloj aŭ tertremoj. Sed tio estas ĝuste la afero, kontraŭ kiu kampanjas triamondaj landoj en la kadro de la nunaj debatoj pri Nova Komunikada Ordo en la mondo.

La recenzata libro estas senpretenda, didaktike aranĝita manlibro pri la lando, kies pasintecon kaj estantecon ĝi prezentas tre klare. Ankaŭ se vi jam havas vian opinion pri Vjetnamio kaj ne pretas ŝanĝi ĝin, valoras tamen scii, kion iuj vjetnamoj opinias pri si mem.

Teknike kaj lingve ĉi tiu libro apartenas al la plej bonaj iam eldonitaj en tiu lando.

Renato Corsetti (Italio)

Pri kvin libroj kune

Pri Jugoslavio, de I. Graovac kaj M. Nobilo. El la kroata trad. R. Imbert. Zagreb: Kroatia E-Ligo, 1980. 64p. 20cm. Prezo: 4,50 gld.

Tito, de D. Stuparić, M. Krleža kaj I. Borovečki. Div. tradukintoj. Zagreb: Kroatia E-Ligo, 1980. 121p. 20cm. Prezo: 15,00 gld.

La historiaj radikoj de nealianciĝo, de E. Kardelj. Trad. R. Imbert. Sarajevo: E-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, 1980. 65p. 20cm. Prezo: 6,00 gld.

Meze de Eŭropo. . .; Skizo pri la historio de Ĉeĥoslovakio, de div. aŭtoroj. Trad. el la ĉeĥa pluraj. Prago: Panoramo, 1980. 99p. Ilus. 21cm. Prezo: 5,40 gld.

Skizo pri Ĉinio. Beijing: El Popola Ĉinio, 1981. 100p. Ilus. 19cm. Kun mapo. Prezo: 3,60 gld.

Jen kvin broŝuroj, kiujn ni pro ilia komuna trajto – certagrada oficialeco – prezentu kune. Tri el ili estas eldonitaj en Jugoslavio. La artikolkolekto *Pri Jugoslavio* traktas mallonge la modernan historion kaj nunan politikon. En la broŝuro kun la titolo *Tito* ni

legas kun interesiĝo la priskribon (de Ivo Borovečki) de la rilato inter "Tito kaj Esperanto", sed min pleje impresis la malkonvencia maniero, kiel rakontas Miroslav Krleža, ĵus mortinta, pri sia amiko. Altnivela estas la studo de Edvard Kardelj, *La historiaj radikoj de nealiancigo*. Kardelj estis la ĉefa kunlaboranto de Tito ĝis sia morto en 1979. Sed multo, kion li konstatis (en 1975) pri la signifo de la eksterblokaj landoj, restas atentinda, parte eĉ aktuala.

Meze de Eŭropo. . . estas provo resumi sur malpli ol 100 paĝoj, "en telegrafe koncizaj komunikoj", kiel diras la antaŭparolo, la historion de Ĉeĥoslovakio, dum *Skizo pri Ĉinio* donas, sur precize 100 paĝoj, bazan enkondukon ne nur en la historion, sed ankaŭ en la geografion, politikon, ekonomion kaj kulturon de Ĉinio.

Ulrich Lins (Japanio)

Ankaŭ antologio

Skiza historio de la utao, de Masao Miyamoto (1913-). Toyonaka: La Kritikanto, 1979. 85p. 21cm. Prezo: 14,70 guldenoj.

Montriĝis, ke temas pri historio de la japanlingva utao, ne de Esperanta, kiel leganto povus supozi. Ni tuj konsciiĝis, ke en Esperanto la utao, tankao aŭ – kiel iuj poetoj dorlote nomas ĝin – miniaturo, japaneska foto, japaneska kanto, ne estas tiel multe ekspluatita, kiel aliaj poemformoj. Ĉu ni do elreviĝis? Post trafoliumo de la maldika sed eleganta japanstila broŝuro, kaj precipe post iom pli zorga lego de la tuta libro, mi volas aserti: ĝi ja indas legon. La kaŭzo estas duobla.

Unuflanke, la libro traktas temon, kiun oni ekster la japana lingva teritorio malmulte prizorgas. En la ĉinaj periodaĵoj – inkluzive de la ĉefa ĵurnalo *Renmin ribao* –, ekzemple, komencis aperi eble ekde 1978 ĉinlingvaj utaoj kaj hajkoj, originale verkitaj, kiuj vekis ĉe la vasta ĉina legantaro grandan intereson. La du japanaj poemspecoj nun minacas hejmiĝi inter la multaj fiksformaj poemoj en la ĉina poezio, same kiel ili jam familiariĝis en Esperanto.

La libro skizas – sufiĉe detale por ordinara leganto – la originon kaj disvolviĝon de la utao, dividante ĝian historion en kvar etapojn. Ne estis ekster nia konjektokapablo, ke ". . . la japana utalo naskiĝis ideologie de la ĉina kaj korea kulturo. . ." (p. 5).

Aliflanke, la libro estas ankaŭ siaspeca antologio de ĉ. 270 utaoj, plus kelke da long-utaoj de diverstempaj aŭtoroj, kiuj konvene mozaikiĝas en la tuta teksto. Tiel, ne nur la evolua fadeno, sed ankaŭ la tipe japana etoso estas facile percepteblaj por la leganto.

Tiu, kiu esperas el la libreto sorbi iomete da natura ĉarmo kaj pura sento de la Lando de Sunleviĝo, ne trompiĝos. La lingvaĵo de Masao Miyamoto estas flua, facile legebla. La tradukoj de la utaoj – preskaŭ ĉiuj faritaj de li mem – estas senriproĉaj.

Xu Daorong (Ĉinio)

Laste aperis . . .

Brazilaj geografiaj nomoj, Délio Pereira de Souza. Brasília: Laborgrupo "Antaŭen", 1981. 72p. 20cm. Brazilaj Kajeroj 1. Esperantaj formoj de ĉiuj ŝtatoj kaj gravaj urboj, riveroj, montaroj ks. de la plej granda sudamerika lando, kun bazaj informoj. Prezo: 3,90 gld.

De Francisko el Asizo por vi. . .; Pacon kaj fratecon, Humberto Leite de Araújo. El la portugala tr. Délio Pereira de Souza. Rio de Janeiro: Edições Aliança da Fraternidade, 1981. 326p. Ilus. 21cm. Drama rakontado pri la vivo kaj kredo de unu el la plej amataj kristanaj sanktuloj. Prezo: 20,10 gld.

El subaj fontoj, Eli Urbanová (1922-). Prago: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1981. 96p. Ilus. 21cm. Sentoriĉaj, dramaj, muzikplenaj versaĵoj de unu el niaj plej konindaj poetinoj. Prezo: 4,80 gld.

Jaro 1982, La (Praktika poŝkalendaro). Red. Stefan Maul. Brasschaat: TK/Stafeto, 1981. 160p. Ilus. 15cm. Aldone al kalendaro kun ĉiunaciaj festotagoj, aperas informoj pri geografio, trafikreguloj, unua helpo, matematikaj formuloj ks., kaj ankaŭ vortareto Esperanta-franca-hungara-svahila. Prezo: 9,30 gld.

Kial la infanoj lernu Esperanton?, Erika Linz. Elmstein: Esperanto Eldonejo Palatina, 1981. 15p. 21cm. ISBN 3 922682 09 X. Prelego farita en Brazilo en 1970. Prezo: 2,40 gld.

Monda ekonomio. Red. Martin Haase. Rotterdam: TEJO, 1981. 67p. Ilus. 21cm. Raporto pri seminario organizita de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO pri la t.n. Nova Internacia Ekonomia Ordo. Prezo: 6,00 gld.

Mondo kaj koro (1921), Kálmán Kalocsay (1891-1976). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1981 (fotorepreso). 32p. 15cm. La unua originala kolekto de la ĉefa Esperanta poeto de la intermilita periodo. 24 poemoj, i.a. frua versio de "Iras abiturient' ". Prezo: 12,00 gld.

Luzidoj, La (1572), Luiz Vaz de Camões (1524-1580). El la portugala tr. Leopoldo H. Knoedt. Chapecó: Fonto, 1980. 464p. Ilus. 21cm. Serio Oriento-Okcidento n-ro 14. Unu el la plej ekscitaj eposoj de la monda literaturo, pri la portugala popolo kaj precipe pri la navigado de Vasco da Gama en Afriko kaj Azio. Vere majstra traduko, kun ilustraĵoj de diversaj artistoj. Prezo: 43,20 gld.

Migrante tra metioj, Valo (ps. de R. Laval, 1900-). Laroque Timbaut: Broŝurservo de SAT, 1982. 111p. Mimeo. 21cm. Aŭtobiografia. Prezo: 5,40 gld.

Nguyễn Trãi; Unu el la plej belaj figuroj de la vjetnamaj historio kaj literaturo. El la vjetnama tr. Nguyen Minh Kinh kaj Dao Anh Kha. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo "Ruĝa Rivero", 1980. 101p. 19cm. El la verkaro, poezia kaj proza, de patriota beletristo (1380-1442), kiu rezistis Ming-dinastian invadon. Kun konciza biografio. Prezo: 6,00 gld.

Pesi elefanton. El la ĉina. Beijing: El Popola Ĉinio, 1981. 91p. Kolorilus. 21cm. 88-Es-181P. Sep rakontoj pri infanoj kiuj per lerto kaj persisto sukcesas plenumi malfacilajn taskojn. Prezo: 7,50 gld.

Proverbaro franca-Esperanta, kun aldono: Esprimoj sankciitaj de l' uzado, Lucien Bourgois. Noyelles-Godault: Nordfranca Esperanto-Federacio, 1981. 47p. Ilus. de Jean Paul Peru. Mimeo. 30cm. Prezo: 5,40 gld.

Ridi vjetname. El la vjetnama. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo, 1981. 66p. Ilus. 16cm. Anekdotoj el la feŭda epoko. Prezo: 5,10 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18 procentoj por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: por la mendoj sub la valoro de 200 guldenoj – 20 procentoj, por la mendoj super 200 guldenoj – 10 procentoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

TEJO-paĝo

Ĉi tiun rubrikon redaktas: IAN JACKSON, p/a Esperanto-Centro, 140 Holland Park Ave., London, Britio, W11 4UF.

EKSTERAJ RILATOJ DE TEJO:

Jam preparoj por Junulara Jaro en 1985

DE LA 30a de novembro ĝis la 3a de decembro 1981, okazis en Berno (Svislando) la dua konsultiĝo de la Kadro de Tuteŭropa Junulara kaj Studenta Kunlaboro (KTJSK aŭ la "Kadro").

Al tiu tre grava kunveno de internaciaj neesperantistaj junularaj organizaĵoj kaj naciaj junularaj komitatoj ankaŭ TEJO, kiel membro de la Kadro, sendis delegacion: Elisabeth Schwarzer kaj Martin Haase (ambaŭ el FR Germanio).

TEJO jam vigle partoprenis la laboron de tiu tuteŭropa kunlabora forumo kaj estas ĝia membro ekde ties fondiĝo en 1980. Dum la unua konsultiĝo en Budapeŝto, oni decidis daŭrigi la laboron inter la kunvenoj, kiuj okazu unufoje jare, en malgrandaj laborgrupoj. Tiam TEJO aliĝis al tri el ili: medio kaj mediprotektado, malarmado, Nova Internacia Ekonomia Ordo.

La partopreno en tiu aktiveco pruviĝis ĝenerale tre sukcesa. Sur la kampo de Nova Internacia Ekonomia Ordo, TEJO povis utiligi tiujn kontaktojn por sukcesigi sian samteman seminarion en junio 1981. Ni ankaŭ sukcesis enigi la problemon de lingva imperiismo kaj de Nova Monda Internacia Komunika Ordo en la liston de studendaj temoj. Specialan atenton ricevis nia kolekto de pli ol 40 presaĵoj pri tiuj kaj aliaj temoj ligitaj al la problemo de Nova Internacia Ekonomia Ordo. Ĝin preparis por la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO Hans Bakker.

La partoprenantoj de la dua konsultiĝo, kies ĉefa tasko estis pritakso de la farita laboro kaj pridiskuto de farendaĵoj por 1982, ĝenerale tre kontentis pri la atingitaj rezultoj. Oni decidis daŭrigi la menciitan aktivecon, al kiu TEJO denove aliĝis. Krome, la delegacio esprimis la pretecon de nia organizaĵo partopreni la laborgrupon pri turismo kaj junularaj interŝanĝoj kaj la agadunuon pri rilatoj al UN kaj la Internacia Jaro de la Junularo (1985).

Estas nerefuteble, ke Esperanto ludas gravan rolon sur la kampo de turismo, kaj tiel do ankaŭ TEJO. Ĝi povas en tiu laborgrupo interalie atentigi pri Pasporta Servo, sia listo de gastigantoj, preskaŭ same unika kiel la delegita reto de UEA. Ni esperu, ke eblos aŭdigi la avantaĝojn de Esperanta turismo kaj ankaŭ ricevi novajn ideojn por nia aktiveco en ĉi tiu sfero.

Aliĝon al la agadunuo pri rilatoj al UN kaj la Internacia Jaro de la Junularo necesigis la ĉiam pli fortiĝantaj ligoj de TEJO al la UN-sistemo: Dum la lasta kunveno de ĜIM, t.e. Ĝeneva Neformala Kunveno ĉe UN (81 10 17-19), kie reprezentis nin Norberto Saletti (Italio), TEJO fariĝis raportanto pri la venonta kunsido kaj membriĝis en la gvidorgano de ĜIM, la t.n. konstanta prepargrupo. Pri la preparoj por la Junulara Jaro 1985 okazis jam neformala kontakto inter M. Haase kaj Amr Ghaleb (UN-junulfako) dum la Ĝenerala Asembleo de la Eŭropa Kunordiga Buroo de Internaciaj Junularaj Organizaĵoj, de la 20a ĝis la 22a de novembro 1981.

TEJO ne plu pretervideblas en la medio de internaciaj neregistaraj junularaj organizaĵoj. Tio vidiĝis ankaŭ dum la intervjuo de la TEJO-delegacio ĉe la Esperanto-fako de Svisa Radio Internacia aranĝita de s-ro C. Gacond. Tiu intervjuo malkovris ankaŭ kritikeblajn punktojn de la menciitaj junularaj kunvenoj. Unu el ili

Barbara Despiney, kiu jam de pluraj jaroj reprezentas TEJOn ĉe la junulara fako de Unesko

estas, kompreneble, la lingva problemo, ĉar ĝenerale uzeblas nur la angla kaj la franca lingvoj. Certagrade ligita al tiu problemo ŝajnas la manko de vere junaj reprezentantoj en tiuj kunvenoj. Efektive, nur malmultaj ĉeestantoj en Berno venis de la bazo de la koncernaj organizaĵoj. Multaj el ili ofte jam de jaroj laboras kiel pli-malpli altrangaj funkciuloj aŭ plentempaj dungitoj de sia organizaĵo. Kelkaj, venantaj el politika medio, estas ankaŭ parlamentaj deputitoj, sed tia ne estas la plimulto. La "politikistoj" sukcesis de tempo al tempo perdigi la kunvenon en sencelaj politikaj diskutoj, kiuj malhelpis la progreson de pli praktika kaj efika laboro.

Ambaŭ ĉi-lastajn problemojn TEJO povas helpi solvi, ĉar nia organizaĵo ne havas rigidan hierarkion, tiel ke ĝiaj reprezentantoj venas rekte de la bazo. Krome, TEJO estas unu el la malmultaj organizaĵoj, kiuj havas landajn sekciojn samfortajn el la okcidenta kaj orienta Eŭropo. Ĝi do estas ne nur tutmonda, sed ankaŭ tuteŭropa junulara organizaĵo. Tial TEJO havas fortan intereson pri la "Tuteŭropa Kadro" kaj tial ni povas en tiu neŭtrala forumo kontribui al komprenemo en junulara medio.

Martin Haase

Nekrologoj

FELIX EPSTEIN (1882-1982), kiu la 3an de septembro ĉi-jare fariĝus 100-jara, mortis la 18an de januaro en Hamburgo (FR Germanio). Epstein lernis Esperanton en 1906, por du jarojn pli poste membri en la LKK de la 4a UK en Dresdeno kaj tie konatiĝi kun Zamenhof. En 1910 li kunfondis la regionan organizaĵon Nordokcidentgermana E-Ligo, kaj post la Dua Mondmilito helpis revivigi Germanan Esperanto-Asocion, kies estrarano li estis inter 1947 kaj 1951. Epstein havis apartajn meritojn pri la postmilita re-aliĝo de GEA al UEA. Li estis honora membro de GEA. La ĉefa administra ĉambro en la CO de UEA portas la nomon "Hamburgo", pro tiucela donaco de la forpasinto. Bonhava bankoficisto, Epstein frue akiris en la Movado la renomon de bibliofilo. Sian riĉan Esperanto-bibliotekon, kun multaj raraĵoj, Epstein pasintjare donacis al Germana Esperanto-Instituto.

PETRO POLIŜČUK (1910-1981), tradukinto de *La kaŝmira kanto* de Ŝaraf Raŝidov (1967) kaj *Zejnab' kaj Aman'* de Ĥamid Alimĝan (1968), mortis subite en oktobro, en Taŝkento (Uzbeka SR, Soveta Unio). Li estis fakdelegito de UEA pri televido. Aperis kelkaj originalaj noveloj de li.

H.V. RASMUSSEN (1919-1982) forpasis la 9an de januaro en Kopenhago. Li estis tre aktiva en la Movado dum pluraj jardekoj, i.a. kiel estrarano de la antaŭa Centra Dana Esperantista Ligo, kies gazeton, *Dansk Esperanto-Blad*, li redaktis inter 1951 kaj 1953. En 1958 kaj 1959 li estis kunredaktoro de ĉi tiu revuo. Komence de 1981 li fariĝis kunredaktoro de la revuo *Horizonto*. Rasmussen aparte interesiĝis pri la fonetiko de Esperanto kaj faris plurajn tiurilatajn kursojn en Kopenhago.

GURGEN GRIGORI SEVAK (1904-1981), unu el la tre malmultaj sovetaj esperantistoj aktivaj kaj antaŭ kaj post la dua mondmilito, forpasis la 14an de septembro en Erevan (Armena SR, Soveta Unio). Li lernis la lingvon en 1921, kaj en la dudekaj kaj tridekaj jaroj li multe

tradukis el la armena por la Esperanta gazetaro. En 1930 eldoniĝis lia lernolibro por armenoj. En 1932 li elektiĝis al la Lingva Komitato (antaŭulo de la Akademio de Esperanto, kies membro li ankaŭ estis). Ekster la Esperanto-movado Sevak ĝuis grandan renomon kiel lingvisto, specialisto pri la armena kaj la kartvela. Li siatempe prezidis la Armenan Esperanto-Komisionon, kaj poste la armenan filion de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj. Prof. d-ro Sevak plurfoje reprezentis la sovetan esperantistaron ĉe eksterlandaj kongresoj.

OTTO KAYSER (1905-1981), delegito en Speyer (FR Germanio), iama prezidanto de Sudokcidentgermana Esperanto-Ligo, kiu instruis en multaj Esperanto-kursoj, mortis la 29an de decembro.

VICTOR L. CAO (1917-1982), urugvaja diplomato kaj universitata profesoro, forpasis la l-an de januaro.

ELLEN LEWIS (1941-1981), delegito de UEA en Boston (Usono) kaj loka E-aktivulino, mortis antaŭnelonge.

Loke

Kanado

• Post artikolo en loka ĵurnalo en Toronto, 300 personoj petis la unuan lecionon de senpaga koresponda kurso de Esperanto, gvidata de s-ro Kriss Smilga. Tiel grandan interesiĝon neniu atendis, kaj oni ne memoras, ke io simila antaŭe okazis en Kanado.

Jugoslavio

• Okaze de la 800-jara jubileo de la urbo kaj omaĝe al la Zamenhofa Tago, inter la 15a kaj 19a de decembro 1981, en Varaždin okazis ekspozicio de la Esperanta literaturo. Dum la inaŭguro, en la urba biblioteko, s-ino Zdenka Ivek prelegis pri Zamenhof antaŭ multnombra publiko.



• **Ĉeĥoslovakio: En la silezia urbeto Frýder-Místek antaŭ kelka tempo okazis tre ampleksa kaj sukcesa ekspozicio de granda kolekto de Esperanto-libroj. La ekspozicion malfermis direktoro de la loka kulturdomo, kie la kolekto estis eksponita sub la titolo, kiun montras la supra foto de Marie Bartovská.**

Aŭstralio

• En la 23a Aŭstralia Esperanto-Kongreso, okazinta inter la 2a kaj 9a de januaro 1982 en Adelajdo, partoprenis 124 personoj. "Preskaŭ ĉiuj aktoris, prelegis, deklamis aŭ kantis sur la scenejo", skribas al ni R.G. Robertson, antaŭa prezidanto de Aŭstralia Esperanto-Asocio. Dum la Kongreso "oni prezentis kvin teatraĵojn, pupteatraĵon, farsan pantomimon kaj kvar dulingvajn skeĉojn. Pro neatendita malsano mankis du aliaj longaj teatraĵoj."

Malto

• 215 salutleteroj venis al Malta Esperanto-Societo, por letervespero en decembro, okaze de la 20a datreveno de tiu landa organizaĵo. Tiu poŝta lavango rezultis el anonceto en nia septembra numero pasintjare. (Jen respondo al via demando, ĉu valoras aperigi anoncojn en ĉi tiu revuo!) Cetere, komenciĝis du novaj E-kursoj en Malto, kun 35 gelernantoj.

Venezuelo

• Fine de 1981, dum sia ĝenerala asembleo, Venezuela Esperanto-Asocio resumis dujaran agadon: Okazis 6 E-kursoj, el kiuj 5 en la Centra Universitato en Karakaso. Tiujn kursojn finis 123 gestudentoj. Aperis 22 artikoloj pri Esperanto en la nacilingva gazetaro. La Internacia



Lingvo estis prezentita kvarfoje en la televido. Prof. Jorge Mosonyi (sur la foto) estas reelektita kiel prezidanto. Unu el la ĉefaj problemoj de la Asocio estas la koncentriĝo de la agado en la ĉefurbo. Tamen, nun oni jam elektis reprezentantojn en kvar aliaj venezuelaj urboj.

FR Germanio

• Okaze de la tradicia Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo, dum la jarŝanĝaj tagoj, la Internacia Lingvo estis kelkfoje prezentita en la germana televido. Ni vidis kelkminutan prezenton en la ĉefaj programo kaj novaĵelsendo, je la plej konvena horo – la 8a vespere – la 2an de januaro. Tiun favoran informon pri Esperanto vidis certe kelkdeko da milionoj da spektantoj.

vio). Ŝajnas, ke tie prezentiĝis nur tri teatraĵoj. Laŭ aliaj informoj, kiuj atingis nin, multe pli granda estos la Renkontiĝo de Esperantaj Teatroj en la kadro de Budapeŝta Printempa Festivalo, inter la 19a kaj 28a de marto 1982. La programo de la Renkontiĝo ampleksas 12 spektaklojn de 9 teatraĵoj, en la plenumo de 5 teatraj trupoj. Estas interese, ke en Budapeŝto grave rolos du novaj trupoj, kiuj ĝis nun ne prezentiĝis internaciskale: Hungara Esperanto-Teatro kaj Leningrada Esperanto-Teatro. Pri aliĝoj kaj aliaj detaloj skribu al: Hungara E-Asocio, Pf. 193, H-1368 Budapest.

Persone

Chicot

• S-ro Emmanuel Chicot, kiu jam de pluraj jaroj reprezentas UEA ĉe Unesko en Parizo, havas novajn adreson kaj telefonnumeron: 40 square des Marronniers, F-78870 Bailly, Francio; telefono: (03) 462 55 76.

Cunha

• S-ro Carlos Augusto Siqueira da Cunha, kiu estis kasisto de la 66a UK en Brazilio kaj unu el la plej

aktivaj LKKanoj, havas nun gravan funkcion en la brazila Esperanto-movado. En sia kongreso, komence de novembro en San-Paŭlo, Brazila Konsilantaro de Esperanto – tiu tria E-organizaĵo en Brazilo – elektis s-ron Cunha la nova prezidanto. La ĝisnuna prezidanto, s-ro F. Souza Almada, fariĝis honora prezidanto de la Konsilantaro.

Fake

Literaturo

• Lanĉo de Esperanta libro malofte okazas en la ĉefsidejo de landa asocio de verkistoj. Tian honoran debuton havis la 15an de decembro – Tago de la Libro – *Moderna kroatia prozo*, en la sidejo de Asocio de Kroatiaj Verkistoj en Zagrebo (Jugoslavio). Pluraj el la 34 verkistoj reprezentitaj en tiu antologio ĉeestis la solenaĵon. Parolis la redaktoro de la libro, d-ro Ivan Krtalić, kaj la tradukinto, s-ro Roger Imbert. (Aliajn informojn pri la libro vidu en anonco sur la lasta kovrilpaĝo.)

Teatro

• Ni ne havas multajn informojn pri la teatra renkontiĝo, kiu okazis fine de novembro en Pula (Jugosla-

Ĉu vi ankoraŭ ne abonis?
ABONU NUN!
Jarabono US $10 (12 numeroj)

Adreso: 7008 Millwood Road, Bethesda, Maryland 20034, Usono

Abonebla ĉe UEA: 25,00 gld.
Provekzemplero 2 irk.

La membraro de UEA en 1981

Lando	AM	IM	Sumo
Afganio	-	1	1
Albanio	-	1	1
Alĝerio	-	2	2
Andoro	-	1	1
Argentino	293	137	430
Aŭstralio	118	113	231
Aŭstrio	225	72	297
Belgio	1263	222	1485
Bermudo	-	1	1
Bocŭano	-	1	1
Bolivio	-	2	2
Brazilo	625	639	1264
Britio	869	338	1207
Bulgario	5110	84	5194
Ĉeĥoslovakio	2213	118	2331
Ĉilio	45	18	63
Ĉinio	1108	19	1127
Danlando	325	118	443
Egiptio	-	2	2
Ekvadoro	-	1	1
Finnlando	480	229	709
Francio	545	583	1128
FR Germanio	1005	485	1490
Germana DR	500	31	531
Greklando	375	24	399
Gvatemalo	-	1	1
Hinda Unio	-	18	18
Hispanio	430	149	579
Hongkongo	-	6	6
Hungario	3068	169	3237
Indonezio	-	3	3
Irako	-	1	1
Irano	-	59	59
Irlando	32	8	40
Islando	16	37	53
Israelo	250	54	304
Italio	1480	242	1722
Jamaiko	-	1	1
Japanio	1296	343	1639
Jugoslavio	709	167	876
Kamerunio	-	1	1
Kanado	163	88	251
Kenjo	-	1	1
Kolombio	-	28	28
Korea Resp.	280	39	319
Kostariko	-	2	2
Kubo	-	9	9
Kuvajto	-	1	1
Libano	-	1	1
Liberio	-	1	1
Luksemburgo	98	7	105
Madagaskaro	-	1	1
Malajzio	-	2	2
Malto	42	1	43
Maroko	-	2	2
Martiniko	-	1	1
Meksikio	31	28	59
Mongolio	-	2	2
Namibio	-	1	1
Nederlando	407	423	830
Nepalo	-	1	1
Nigerio	-	2	2
Nikaragvo	-	1	1
Norvegio	363	102	465
Nov-Zelando	103	65	168
Pakistano	-	4	4
Peruo	24	15	39
Pollando	4150	153	4303
Portoriko	-	2	2
Portugalio	219	28	247
Rumanio	-	29	29
Salvadoro	-	1	1
Sanmarino	-	1	1
Senegalio	-	1	1
Singapuro	-	1	1
Sirio	-	1	1
Soveta Unio	-	81	81
Srilanko	-	4	4
Sud-Afriko	43	23	66
Sudano	-	1	1
Sud-Jemeno	-	1	1
Svazilando	-	1	1
Svedio	986	448	1434
Svislando	196	169	365
Tajlando	-	4	4
Tunizio	-	2	2
Turkio	-	1	1
Urugvajo	-	4	4
Usono	310	412	722
Vatikano	-	1	1
Venezuelo	12	17	29
Vjetnamio	-	4	4
Zairio	21	8	29
93 landoj	**29828**	**6727**	**36555**

LAŬKATEGORIA RESUMO DE LA MEMBROSTATISTIKO DE UEA POR 1980 KAJ 1981

Kategorio	1980	1981
Membro-Jarlibro	1133	1239
Membro-Abonanto	4133	4077
Dumviva Membro	987	984
Honora Membro	21	22
Juna M-Jarlibro	134	147
Juna M-Abonanto	221	258
Individuaj Membroj	**6629**	**6727**
Asociaj Membroj	20490	21630
Junaj As. Membroj	7064	8198
Membroj entute	**34183**	**36555**
Societo Zamenhof	226	207
Abonoj *Esperanto*	273	278
Kolektivaj abon. *Eo*	2213	2115
Abonoj *Kontakto*	232	252
Kolektivaj abon. *Kto*	50	120
Patronoj TEJO	37	51
Kotizoj entute	**36951**	**39578**

RIMARKOJ KAJ KLARIGOJ

Dum multaj jaroj vi kutimis trovi ĉi tian statistikan prezenton de la membraro en niaj numeroj de marto, foje eĉ pli poste. Nu, tio okazis en la epoko, kiam la CO de UEA ne havis komputilon. Tiam necesis kateni iun al seĝo, dum pluraj tagoj, por foliumi milojn da membroslipoj kaj fari saman nombron da miloj da tiaj famaj streketoj – vi memoras: kvar vertikale, unu horizontale. Nun ĉio ĉi okazas rapidege, komputile, per premo de la ĝusta klavo aŭ butono. Se ni do povis unuafoje statistiki la membraron de 1981 per la komputilo – vi divenas –, ke nun la tuta individua membraro, do ĉiuj 6727 adresoj, troviĝas en la komputilo.

Pri la statistika prezento ne necesas multon diri ĉi-foje. Se vi ŝatas rekordojn, bonvolu noti, ke rekordaj estas la sumaj nombroj de la asociaj membroj kaj sekve ankaŭ de membroj entute. Rimarku ankaŭ la kreskon de la individua membraro, kion oni ĉefe dankas al la kresko en la pasintjara kongresa lando – Brazilo. Kompreneble, malantaŭ ĉiu membro en la ĉi-supra trarigardo staras enkasigita kotizo. Ni esperu, ke kreskoj kaj rekordoj ripetiĝos ankaŭ en 1982.

NOVAJ KOTIZOJ POR ARGENTINO KAJ BRAZILO: Kiel antaŭvidite (vidu nian oktobran numeron, p. 179), montriĝis necese fiksi novajn kotizojn por la individuaj membroj en tiuj du landoj. Jen ili: Brazilo: MJ-(K) 1040, MA-(K) 2600, SA/PT 1560, Kto 780, SZ 5200 kruzejroj; Argentino: MJ-(K) 86000, MA-(K) 215000, SA/PT 129000, Kto 64500, SZ 430000 pesoj. La kotizoj validas ekde la 1-a de januaro 1982.

Oficiala Informilo

N-ro 550

ADRESŜANĜO POR FINNOJ

La kotizperanto de UEA en Finnlando havas novan adreson: s-ino Sirkka Salmivaara, Hurtankatu 6, SF-05820 Hyvinkää 2; tel. (914) 1 90 35.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Finnlando: E. Pynnonen. Japanio: Kôzô Ueda.

SOCIETO ZAMENHOF 1981

BRAZ: 207 Jair R. Peixoto Laguna. SVED: 208 Bertil Bengtsson; 209 s-ino Gurli Nylin.

DONACOJ 1981 (Gld.)

ĝis la 31a de decembro

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO: Nederlando: H.H. Weulen Kranenberg 150,00. Sumo jara 291,20.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Kanado: D. Hawley 175,53. Nederlando: R. Moerbeek 50,00; J.S. Rooke 300,00. Sumo jara 5 973,26.

FONDAĴO CANUTO: Heredaĵo Anuruddha 79,20. Nederlando: E. M. Maasbommel 100,00; R. Moerbeek 50,00; J.S. Rooke 200,00; S.A.K. van der Zee 50,00. Sumo jara 4 723,85.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Nederlando: W. Akkerman 68,00. Sumo jara 3 405,35.

FONDAĴO TEJO: Nederlando: E.M. Maasbommel 100,00; J.S. Rooke 200,00. Diversaj malgrandaj 1,50. Sumo jara 1 358,24.

FONDAĴO EKI: FR Germanio: B. Vogelmann 2 195,70.

ĜENERALA KASO: Anonima 2 068,38; Anonima 2 000,00. Brazilo: M. Borges dos Santos 63,00. Britio: Ch. Field 22,90. Danlando: E. Mortensen Birkbak 67,57. Finnlando: A. Ratalahti 152,28. FR Germanio:J. Weidacher 14,78. Nederlando: W. Akkerman 50,00; G. Ellerman 37,50; F.H. Kat 25,00; E. M. Maasbommel 100,00; M. Meywes 37,50; A.W. Treurniet 36,92; S.A.K. v.d. Zee 75,00; Nederlanda Esperanto-Junularo 355,18. Norvegio: O.J. Rønnevig 24,60. Svislando: s-ino Grütter 54,22; A. Mæder 27,54; H. Schmutz 54,22. Usono: R. Borkow 20,03; J. Cool 25,04. Diversaj malgrandaj 21,52. Sumo jara 17 226,30.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

NOTO: En ĉi tiu revunumero tamen ne aperas ankoraŭ ĉiuj donacoj faritaj fine de 1981. Tio aparte koncernas la donacojn por la Nov-Jorka Oficejo de UEA. Tiurilata listo aperos en unu el niaj sekvaj numeroj.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,85 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj ne respondecas la redakcio.

Ideala feriejo por esperantistoj estas Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Petu informilon!

Pri internacia pacdevigo volas korespondi John C. Lincoln, 3320 East Weldon, Phoenix, Arizona 85018, Usono.

Ĉe-metode instruadu ankaŭ vi, private aŭ lerneje, laŭ: *Esperanto laŭ la patrina metodo*, 320 paĝoj, GM 50,00! 50-instruhora kabareto lernigas **esperante** kaj **germane** ĉiujn demandojn kaj respondojn de la ĉiutaga konversacio! August Weide, Nordalbingerweg 65, D-2000 Hamburg 61, poŝtĝirkonto Hamburg 150 58-209.

Senpage vi ricevas ekzempleron de *La migranto*, riĉe ilustrita revuo pri turismo, naturbelaĵoj, ekologio, naturprotektado. Skribu al: Liesel Nagel, Moosgrund 8, D-7800 Freiburg, FR Germanio.

Komencanto deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj: Wellington Garcia, Av. N.S. da Penha 531/201, Penha, BR-21070 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo.

Volapük-literaturo serĉata. Ofertojn al: SEL, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt.

"La verko plej grava, kiu aperis en kaj pri Esperanto dum la pasintaj dekoj da jaroj." (T.P., Britio.) Prezo: 21 francaj frankoj. Ligue Française "Pro Unesco" (24 ave. de Riedisheim, F-68100 Mulhouse). Poŝtĉekkonto 16.233.37 C Paris.

Malfermu ŝparkonton! Jam pli ol 110 000 guldenojn deponis membroj de UEA en fiksdatajn ŝparkontojn ĉe la Centra Oficejo. Ili gajnas renton de 6% jare kaj samtempe helpas la Asocion. Novaj kaj renovigotaj deponoj ekde 1982 02 01 ĝuas renton de 7%. Petu pliajn informojn de la Centra Oficejo de UEA.

Disko/kasedo *Tra l' mondo* de Olivier Tzaut kaj nova disko/kasedo *Karnavaleto* aĉeteblas ĉe Olivier Tzaut, Arêtes 7, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Pĉk. 23-3656 La Chaux-de-Fonds. Oni mendu skribante sur la ĉekkuponon la deziratan objekton. Prezo (sendokostoj inkluzivitaj): disko: 24 sv.fr. Kasedo: 20 sv. fr. Vendas ankaŭ UEA.

Esperanto en radio

Kompleta tabelo aperis en nia numero de novembro 1981 (p. 200).

RADIO ROMA daŭre elsendas sian programon ĉiun sabaton de 20,00 ĝis 20.20 h. GMT, sed nun per ondoj 41.24m (7275 kHz), 41.15m (7290 kHz), 31.33m (9575 kHz). Raportoj pri aŭskulto estas respondataj per konfirmo-kartoj en Esperanto; senpaga ilustrita plurlingva programkajero, kiu aperas kvarfoje en la jaro, estas ankaŭ havebla. Korespondaĵojn sendu al Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, I-00100 Roma Centro Corr., Italio.

PRI DIVERSAJ STACIOJ. Laŭ peto programfolioj pri esperantlingvaj programoj estas senpage haveblaj de la jenaj stacioj: Berno, Pekino, Varsovio, Vatikano, Vieno.

La legenda heroo Brabo ĵetas manon de giganto por doni nomon al la urbo de la 67a UK. Nia glumarko aperas pli malfrue ol kutime sed kompense kostas pli malmulte: po 6,00 (por Nederlando 6,86) guldenoj por cent brilarĝentaj memgluaj markoj sur vakspapero, inkluzive sendokostojn. Mendu!

ABZ de amo estas havinda popularscienca verko por ĉiu

Ĉi tiun 274-paĝan enciklopedion de la seksa vivo verkis danaj psikologoj Inge kaj Sten Hegeler, kaj tradukis Ib Schleicher kaj August Weide.

Formato: 25cm. Ilustrita. Bindita per ledoimita plasto. ISBN 87 87089 09 2.

Prezo: 33,00 (por Nederlando 34,32) gld. plus la sendokostoj. Por samtempa mendo de minimume 3 ekzempleroj, UEA donas 33-procentan rabaton.

Mendu ĉe: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Ĉu vi havas ion por diskonigi al ĉiuj en la Movado?

La plej simpla kaj — konsiderante ĉion — la plej malmultekosta maniero atingi tion estas anonci en nia revuo. Memoru, ke la revuon legas minimume 13 000 homoj en 94 landoj tra la tuta mondo. Vidu nian anonctarifon sur la dua kovrila paĝo.

Ĉirkaŭ du mil homoj jam havas ĝin!

Kiam en 1970 aperis *Plena ilustrita vortaro* (129,00 gld.), ĝi estis la sola baza verko havebla en la movada libromerkato. En 1974 aldoniĝis al ĝi *Esperanto en perspektivo* (84,00 gld.). Antaŭ du jaroj, Hungara Esperanto-Asocio represis la malnovan *Enciklopedio de Esperanto* (45,00 gld.), kaj — fine — per la eldono de *Plena analiza gramatiko de Esperanto* UEA kompletigis tiun eminentan kvaropon de la bazaj kaj elĉerpaj konsultolibroj pri (pli-malpli) ĉiuj aspektoj de la Internacia Lingvo kaj la Esperanto-movado.

Laŭ la ĝisnuna vendoritmo de *Plena analiza gramatiko*, eblas prognozi, ke ĝuste ĝi, la lasta aliĝinto al la kvaropo, plej baldaŭ forlasos la libromerkaton, ĉar jam nun, unu jaron post la apero, restas malmulte pli ol triono de la 3000-ekzemplera eldonkvanto. Rapidu do mendi!

Plena analiza gramatiko de Esperanto (1935), K. Kalocsay (1891-1976) kaj G. Waringhien (1901-). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1980 (4a tralaborita eldono). 599p. 22cm. Bindita. ISBN 92 9017 022 0. Prezo: 48,00 (por Nederlando 49,92) gld., plus sendokostoj. Triona rabato ekde 3-ekzemplera mendo.

Tutmonda Esperantista Adresaro 1981/(1982)

Enhavante ĉ. 2700 adresojn (kun indikoj pri naskiĝjaro, profesio, hobioj, grado de E-scio, deziro korespondi, preteco gastigi) el ĉ. 60 landoj, ĝi estas **la plej ampleksa esperantista adresaro**. Tuj mendu ĝin ĉe via kutima libroservo aŭ ĉe Info-Servo, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio. Prezo tie: 6,60 gmk. + sendokostoj.

La Amo-Serio

1 *Japanaj fabeloj*, 70 paĝoj, 6,60 guldenoj
2 *Ĉeĥaj fabeloj*, 74 paĝoj, 10,50 guldenoj
3 *Japanaj malnovaj rakontoj*, 127 paĝoj, 10,20 guldenoj
4 *Poezia bukedo por geknaboj de la mondo*, Bertram Potts, 102 paĝoj, 16,20 guldenoj

Ankaŭ havebla: *Japana kantaro*, 41 kantoj kun muziknotoj, 64 paĝoj, 3,30 guldenoj



Ĉiu libro de la "Amo-Serio" enhavas belajn kolorajn ilustraĵojn. Ideala legaĵo por la plej junaj esperantistoj – sed ne nur por ili! Mendu ĉe Amo-Akademio, Tenmori, Kamisdami, Moriyama, Nagoya, 463 Japanujo.

"Niaj grup-kunvenoj estas tedaj, tial mi ne plu vizitas ilin." Certe vi konas tiajn kaj similajn plendojn. Nu, vi ja ne tuj devas fondi – kiel oni faris en japana urbo Nagojo – monatan rondon AMIKARO DE MONATO, sed ankaŭ vi povas profiti el la riĉa materialo, kiun enhavas MONATO, por vigligi viajn kunvenojn. Neniam mankos temoj por priparoli, diskuti, aktiviĝi.

Se ankaŭ vi volas savi viajn grup-kunvenojn, petu varb-materialon ĉe: Eldonejo TK/Stafeto, Miksebaan 65 A, B-3130 Brasschaat, Belgio.

MONATO

internacia magazino sendependa

40 paĝoj DIN A4, riĉe ilustrita. Dek unu kajeroj plus poŝkalendaro jare. Jarabono 59,50 gmk aŭ 960 bfr. La abonon bonvolu sendi rekte al la eldonejo: TK/Stafeto p.v.b.a., Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio – aŭ mendu ĉe landa peranto aŭ UEA (64,00 gld.; por Nederlando 66,56 gld.). Petu provekzempleron kontraŭ du int. respondkuponoj. (Tamen memoru, ke unu persono povas nur unufoje fari tian peton.)



NOVA ANTOLOGIO

34 noveloj de modernaj kroatiaj verkistoj. 604p. Tole bindita. 20x15cm. Prezo: 58,50 guldenoj.

Eldonis: Internacia Kultura Servo, Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio, kaj Edistudio, Pizo, Italujo.

John Wells:

Lingvistikaj aspektoj de Esperanto

Rotterdam: UEA/CED, 1978. 76p. 23cm. ISBN 92 9017 021 2. Klara kaj klera scienca analizo, laŭ la moderna lingvistiko, de la Internacia Lingvo. Nemalhavebla por la serioza esperantisto! Enkonduko • Fonetiko • Morfologio • Sintakso • Leksiko kaj semantiko • Fonetikaj simboloj • Bibliografio • Indekso de terminoj. Prezo: 12,00 guldenoj.